

HORIZONTO

III-a JARO N-o 14 (2)
MARTO-APRILLO 1978

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



URBODOMO

SIGNIFO DE LA MANIFESTO 77

LA NUNTEMPA ETIKO

ESPERANTO KIEL KONGRESLINGVO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76
N.º 2 - Marto - Aprilo 1978

ENHAVO

OMAGE
Arango en Jaca okaze de 50 jaroj... (Jean Thierry, H. V. Rasmussen, M. Sancho Izquierdo, Inés Gastón)
SIGNIFO DE LA MANIFESTO 77 (Ivo Lapenna)
75-jara DATREVENO DE LA LONDONA ESPERANTO-KLUBO (H. W. Holmes)
LA NUNTEMPA ETIKO (Jean Thierry)
ESPERANTO KIEL KONGRESLINGVO (André Albault)
EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJOJ
Kunveno de IEAJ en Jaca
DANKESPRIMO
Letero de Ivo Lapenna
NECESO KAJ LIBERO (Michel Briguët)
KION VI NE LEGOS ALILOKE
Principa Deklaro de la Redakcio
EL LA FRANCA AGAD-GRUPO C.E.P.E...
Unu Konscienca Agmaniero!
BELETRO
Laŭdo-Kantoj al la Virgulino de Nuria (trad. J. Ventura)
En Fruprintempa Tago (Edwin de Kock)
La Timo (trad. Liven Dek)
Tropika Festeno (Bernard Golden)
KONKLUDOJ DE NEM-KONFERENCO... (Peter Diksztejn)
ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)
Redaktas (Ivo Lapenna)
NUNTEMPAJ ESPERANTO KURIOZAJOJ
LA IMPRESOJ DE SIMO MILOJEVIĆ... (J. Thierry)
TRA LA ESPERANTO GAZETARO
Raportas (J. Thierry)
LIBROJ SUB LA LUPEO Recenzas (J. Thierry, I. Lapenna,

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Administracio: Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĉk. Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON N13 4UL. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:
Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700 BRØNSHØJ. Bank-konto, 354-800468, Bikuben Jernbanalle 34, Vanløse. Jarabono: 60,— D Kr.

Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, Pĉk KU 152801-5. Jarabono: 38,— F. Mk.

Franujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5, D-3000 HANNOVER 1. Pĉk. Hannover 120 854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:
K. G. Eliopulos, 130 El. Venizelos Ave., NEA SMIRNI —Attiki—. Bank-konto Nro. 040-753362-40, Nacia Banko de Greklando Eolu-str. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Hungario:
Tibor Szabadi, Pf. 66, H-8800 NAGYKANIZSA. Jarabono: 180,— Ft.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono: 84 izr. liroj.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO, Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.

Luksemburgo:
Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L OLM. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse d'Epargne de l'Etat). Jarabono: 380, luksemburgaj frankoj.

Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.

ESPLUGAS DE LLOBREGAT

(Barcelona - Hispanujo)

**ARANĜO EN JACA OKAZE DE 50 JAROJ DA MODELA LABORO
POR ESPERANTO DE IVO LAPENNA**

Kiel ni mallonge informis en la antaŭa numero de *Horizonto*, en 1978 kompletigas precize 50 jaroj ekde la tempo, kiam prof. d-ro Ivo Lapenna, tiam studento de la unua jaro, ellernis la Internacian Lingvon kaj tuj eklaboris por ĝia disvastigo. En 1929 li estis kunfondinto kaj tuj fariĝis prezidanto de Studenta (poste Akademia) Esperanto-Klubo en Zagreb, kies agadoj kaŭzis la regeneron de la Esperanto-movado en tiu lando. Dum multaj jaroj li estis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo (1937-1950), komitatano kaj estrarano de UEA (1937-1974), ĝenerala sekretario de UEA (1955-1964), ĝia prezidanto kaj honora membro (1964-1974). En 1952 li ekfunkciigis CED kaj estis ĝia honorofica direktoro ĝis la fino de 1974. Prof. Lapenna plu estas prezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (ekde 1957) kaj redaktoro de ĝia altnivela faka periodaĵo, *Internacia Jura Revuo* (ekde 1975). Li estas ankaŭ membro de Akademio de Esperanto. Post la eventoj de Hamburgo pluraj landaj asocioj elektis lin honora membro.

Aldone al sia ampleksa faka verkaro en diversaj naciaj lingvoj prof. Lapenna publikigis plurajn librojn ankaŭ en Esperanto. Jen iliaj titoloj: *Retoriko* (3 eldonoj), *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo*, *La Internacia Lingvo: Faktoj pri Esperanto* (aŭtoro kaj redaktoro), *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj*, *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo* (aŭtoro kaj ĉefredaktoro), *Hamburgo en Retrospektivo* (2-a eldono en 1977). Krome li verkis centojn da artikoloj kaj studoj en Esperanto-periodaĵoj kaj aliajn centojn nacilingve pri temoj el siaj fakoj (internacia juro, internaciaj rilatoj, kompara juro) kaj la Internacia Lingvo.

En sia scienca laboro li atingis du doktorecojn kaj du profesorecojn: doktorecon pri juro kaj doktorecon *honoris causa* pri internaciaj rilatoj, profesorecon pri internacia juro kaj internaciaj rilatoj en la Universitato de Zagreb kaj profesorecon pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro en la Universitato de Londono.

La redakcio de *Horizonto* esperas publikigi en la sekvonta numero intervjuon kun prof. Lapenna pri lia longjara ĉiuflanka agado por Esperanto kaj pri liaj ideoj rilate la estontecon de la movado kaj de la lingvo. Intertempe kelkaj liaj geamikoj kaj kunlaborantoj helpataj de la Organiza Komitato de la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Jaca (22-29 julio 1978) planas apartan aranĝon en la kadro de la konferenco, la 25-an de julio je 21 h., por memorigi tiun unikan jubileon de unu el la plej elstaraj personoj en la historio de la Esperanto-movado, kiu jam dediĉis 50 plenajn jarojn al interna evoluigo de Esperanto surbaze de la Fundamento, al scienca prilaboro de humaneca internaciismo lige kun la socia funkcio de la lingvo kaj al disvastigo de Esperanto en Jugoslavio, sur Balkana Duoninsulo kaj fine en la mondo.

La iniciatintoj kaj la Organiza Komitato de la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado kore invitas ĉiujn nunajn kaj antaŭajn kunlaborantoj de prof. d-ro Ivo Lapenna aliĝi al la konferenco kaj persone partopreni la senpompan kaj modestan, sed sinceran solenaĵon honore al tiu ĉi jubileo.

Por la iniciatintoj:

Jean Thierry,

Prezidinto de la

1-a kaj 2-a Internaciaj

Konferencoj de NEM.

H. V. Rasmussen,

Prezidinto de la

3-a Internacia

Konferenco de NEM.

Por la Organiza Komitato de la 4-a Internacia Konferenco de NEM:

Prof. d-ro M. Sancho Izquierdo,

Prezidanto.

Inés Gastón,

Sekretariino.

Unue kelkajn vortojn pri la kaŭzoj de tiu ĉi iniciato, precipe por la novaj legantoj de *Horizonto*.

La Manifesto 77 de la Esperanto-Movado estis iniciatita komence de 1977 en ligo kun la granda monda moviĝo por respektigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. La iniciatinto kaj kelkaj liaj geamikoj opiniis, ke ankaŭ la Esperanto-Movado, «fidela al humanecaj kaj liberecaj tradicioj», kiel akcentite en p-to 5 de la Manifesto, devas rekonfirmi sian memon per taŭge formulita dokumento kaj aldoni sian «voĉon de firma apogo al Amnestio Internacia, al ĉiuj aliaj organizaĵoj, komitatoj, grupoj aŭ unuopuloj kie ajn en la mondo, kiuj per pacaj rimedoj, sen apliko de perforto, luktas por la realigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, morale kaj devigejzure rekonitaj en internaciaj traktatoj, repromesitaj en la Fina Akto de Helsinki kaj entenataj eĉ en la konstitucioj de la propraj landoj». La kvintesenco de nia Manifesto estas entenata en la titolo:

Por Paco en Libereco — Por Libereco en Paco

La nedisigebla kuniĝo de paco kaj libereco ne estas nur emocia deziro de ordinara homoj, sed samtempe, kaj eĉ pli, postulato de la racio, klare legigita ankaŭ en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj en aliaj bazaj juraj aktoj de la nuntempo, kiel koncize prezentite en la p-toj 1 kaj 2 de la Manifesto.

Siavice, nur en kondiĉoj de paco kaj de respekto al la homaj rajtoj la Internacia Lingvo povas libere disvastiĝadi kaj sukcese plenumadi sian rolon de neŭtrale homa instrumento de komunikado trans la lingvaj baroj kaj ŝtataj limoj. Nur en tiaj kondiĉoj Esperanto povas efike kontribui al internacia kompreniĝo kaj sekve al fortikiĝo de paco. Ĉio-ĉi estas tiel reciproke interdependa, ke Esperanto perdas sian sencon ekster la stato paco-libereco. Evidente, la scio de Esperanto fariĝas preskaŭ komplete senvalora, se, ekzemple, la rajto libere moviĝi, eliri el sia lando kaj reveni en ĝin, aŭ la rajto «peti, ricevi kaj doni informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere al la landlimoj» (art. 13 kaj 19 de la Universala Deklaracio) — por menciigi nur du el la rajtoj rekte litigitaj al la Internacia Lingvo — estas praktike neekzistantaj. Tial ankaŭ UEA eksplicite deklaris en art. 4/2 de sia Statuto de 1948, «*ke la respekto de la homaj rajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo*». Tiuj bazaj ideoj estas prilaboritaj en la p-toj 3-5 de la Manifesto.

Mallonge, laŭ sia enhavo la Manifesto estas konforma al la interesoj de la Internacia Lingvo kaj spegulas la kunligitajn tradiciajn valorojn de humaneca internaciismo, sen kiuj la lingvoprojekto de Zamenhof neniam estus povinta transformiĝi en vivantan lingvon de vivanta internacia lingva komunumaĵo, kaj sen kiuj la estonteco mem de la lingvo estus plej serioze minacata. Nur ignorantoj de elementaj faktoj pri la socia karaktero de la lingvo, aŭ malkuraĝuloj timantaj «kompromiti sin» eĉ per la ombro de siaj veraj pensoj («por ĉiu okazo!»), aŭ ambiciuloj dezirantaj «ne ofendi» la subpremanojn por konservi siajn poziciojn, povas ne vidi aŭ ne voli vidi tion. Aliflanke, personoj kun ne tre puraj konsciencoj rilate la observadon de la fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj en difinitaj landoj, komplete pretervidis la eksplicitan pledon de la Manifesto por la respektigo de la homaj rajtoj «*ĉie en la mondo, kie ili estas krude piedpremitaj*», kaj pro tiu «kulpokomplekso» ili necese aplikis la koncernajn partojn de la Manifesto sole al siaj propraj landoj aŭ al la simpatiaj reĝimoj, kio, kiel atendite, elvokis iliajn atakojn kontraŭ la koncepton mem de la Manifesto.

Diskonigo

Komence de 1977 la teksto de la Manifesto estis sendita al la redakcioj de preskaŭ ĉiuj Esperanto-periodaĵoj, inter ili al *Esperanto* de UEA, kaj al ĉiuj Esperanto-fakoj de radio-stacioj kun la peto diskonigi ĝin. Fakte, nur *Horizonto* publikigis la kompletan tekston (n-ro 2/77), dum pluraj aliaj gazetoj kaj kelkaj radio-stacioj menciis la iniciaton. La Manifesto estis sendita ankaŭ al la Estraro de UEA, al la Plenuma Komitato de SAT, al ĉiuj internaciaj fakaj Esperanto-organizaĵoj kaj, en aprilo-majo, al la landaj asocioj, komitatanoj de UEA kaj ĉ. mil pliaj individuaj personoj. Krome, ĝi estis komunikita al la Organiza Komitato de la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj al la LKK de la 62-a UK kun propono prezenti ĝin por akcepto al la Konferenco, resp. al la Universala Kongreso. Sekve, oni ne povas diri, ke la ĉefaj Esperanto-organizaĵoj, la Esperanto-gazetaro kaj la respondeculoj pri la internaciaj Esperanto-renkontiĝoj en 1977 ne estis informitaj pri la iniciato kaj pri la enhavo de la Manifesto. La Plenuma Komitato de SAT respondis per ĝentila letero, ke ĝi lasas al siaj membroj la decidon ĉu kunsuskribi aŭ ne, kaj kredeble sufiĉe multaj membroj de tiu organizaĵo donis sian apogon. Male, nek la Estraro de UEA, nek la LKK de la 62-UK en Revkiviak reagis en kiu ajn senco. Laŭ la ricevitaj informoj, la propono al UEA kaj al la kongreso apogi la Manifeston eĉ ne estis komunikita al la Komitato de tiu asocio, ankoraŭ malpli al la kongreso. Evidente, kontraŭe al la eksplicita regulo de la art. 4/2 de la Statuto, la posthamburga gvidantaro de UEA ne nur ne deziris apogi la Mani-

feston, sed, eĉ pli, klopodis komplete prisilenti ĝin. En la posthamburgaj kondiĉoj tio ne estas surpriza, kvankam tre bedaŭrinda, ĉar la apogo al la Manifesto fare de UEA estus povinta — aldone al aliaj pozitivaj efikoj — revenigi la Asocion sur la tradician vojon de humaneco kaj demokrateco, kio per si mem estus malfermita la pordon al la necesa unueco de la Esperanto-Movado. Pli surpriza estas la fakto, ke nek IKUE, nek KELI, nek Oomoto, nek aliaj religiaj Esperanto-organizaĵoj, kies agadoj estas formale bazitaj sur etikaj principoj de homeco, donis sian subskribon al la Manifesto.

Apogoj

Malgraŭ la prisilentoj kaj pluraj misprezentoj atingintaj la formon de rekta sabotado, tamen la iniciato mem kaj eĉ la teksto de la Manifesto disvastiĝis sufiĉe kontentige. Ĝi penetris eĉ en kelkajn landojn kun totalecaj aŭ diktatorecaj reĝimoj, kaj trovis tie eĉ pli favoran eĥon ol en la landoj, en kiuj la homaj rajtoj kutime estas observataj: oni devas perdi la liberecon por povi plene aprezi ĝin.

La Manifesto estis malfermita por apogaj kunsubskriboj ĝis la fino de 1977. Ĝin akceptis la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado kaj pluraj Esperanto-organizaĵoj, inter kiuj Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocioj estas escepte gravaj pro la rilato inter iliaj celoj kaj la homaj rajtoj, precipe la rajto je komunikado. Menciindaj estas ankaŭ Esperanto-Asocio de Danaj Instruistoj; Esperanto-societo «Unueco» en Graz; Eŭropa Klubo, Landa Ligo Rejnlando-Palatinato; Hispana Turisma Esperanto-Sekcio; Esperanto-Centro «Rheinland-Pfalz», kaj kelkaj aliaj. La 3-a Internacia Konferenco de NEM, bonege organizita de la Dana Agadgrupo de NEM, evoluigis siajn laborojn sub la slogano de la Manifesto «Por Paco en Libereco — Por Libereco en Paco», kiu dum la tuta Konferenco pendis sur la muro super la podio. Ĝi estis inspira por ĉiuj. La fakto, ke la Konferenco senrezerve apogis la Manifeston, savis la honoron de la Esperanto-Movado kaj rehavigis al Esperanto multajn perditajn simpatiojn.

Pluraj centoj da individuaj personoj subskribis la Manifeston. Inter ili troviĝas gimnaziaj gelnantoj kaj emerituloj, manlaboristoj, farmistoj, metiistoj, komercistoj kaj industriistoj, konsiderinda nombro da ĝeinstruistoj kaj juristoj, multaj kuracistoj, inĝenieroj, lingvistoj, fervojistoj, teknikistoj, centoj kaj profesoroj en universitatoj. Estas rimarkinde kaj iom esperige por la estonteco de UEA, ke sufiĉe multaj el ĝiaj nunaj funkciuloj — ĉefdelegitoj kaj perantoj, delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj — donis sian apogon. Tamen, inter ili troviĝas eĉ ne unu membro de la du posthamburgaj estraroj de UEA, nek de la nuna gvidantaro de CED, nek unusola el la geoficistoj de la CO. Kaj ankaŭ tio klare karakterizas la nunan situation. Krome, la Manifeston subskribis multaj aliaj elstaraj kaj konataj esperantistoj, ekzemple la Honora Prezidanto de UEA de 1964-1974, la prezidanto de ILEI, la prezidanto de la LKK de la UK en 1979, la sekretario kaj kelkaj membroj de la Akademio de Esperanto, pluraj prezidantoj kaj sekretarioj de landaj asocioj aliĝintaj al UEA kaj de gravaj lokaj Esperanto-societoj. La sola persono, kiu retiris sian subskribon, estas d-rino L. Gabrielli.

La apogantoj ofte skribis instigaĵn, eĉ kortuŝajn, akompanajn leterojn. Precipe kuraĝigaj estas la komentoj el landoj kun totalecaj reĝimoj. Unu eĉ telefonis el tre granda distanco por esprimi sian entuziasmon pro la agado kaj por aldoni sian apogon en la lasta momento. En alia kazo reprezentanto de tuta komitato por la civitanaj rajtoj en sia lando telefone alvokis por gratuli kaj danki.

Komunikoj al interesitoj

En januaro 1978 la Manifesto en Esperanto kaj en la angla kaj franca tradukoj estis sendita al la Generala Sekretario de UN, Generala Direktoro de Unesko, Komisiono de UN pri la Homaj Rajtoj, Komitato de la Homaj Rajtoj ĉe UN (formita konforme al Parto IV de la Pakto pri la Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj de 1966), Prezidanto de la Eŭropa Komisiono pri Homaj Rajtoj, Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj, Sekretariato de la Beograda Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo, Amnestio Internacia kaj al aliaj organizaĵoj, komitatoj kaj grupoj agantaj por la homaj rajtoj en diversaj landoj. Al la Manifesto estis aldonita mallonga listo de 160 subskribintoj, kio estas proksimume unu okono de ĉiuj individuaj subskribintoj. En akompana letero estis donitaj informoj pri la celo de la iniciatito. Kompreneble, ne estis menciitaj la Esperanto-organizaĵoj, kiuj ne subskribis la Manifeston, kvankam laŭ siaj statutoj kaj antaŭaj agadoj ili estus devintaj fari tion.

La Internacia Sekretariato de Amnestio Internacia kore dankis per sia letero de 07.02.78 «pro la tre instiga Manifesto 77» kaj «speciale aprezis la kuraĝigajn vortojn apoge al la laboro de Amnestio Internacia». La nuna gvidantaro de UEA konscie malobservis plian parton de art. 4/2 de la Statuto, laŭ kiu «ĝi /UEA/ rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur ne-politika bazo klopodas efektivigi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio». Amnestio Internacia estas nepolitika mond vasta movado nor la homaj rajtoj, sed la nuna gvidantaro de UEA, regata de partipolitikaj faktoroj kontraŭaj al Amnestio Internacia, ne povis «rilati simpatie» al tiu movado.

La franca presagentejo AFP du fojojn publikigis ampleksajn informojn pri la Ma-

nifesto kaj pri la agado por liberigo de Jurij Belov lige kun la Manifesto. Pri la samo raportis ankaŭ la loka gazetaro okaze de la Tria Konferenco de NEM.

Konkludo

La Manifesto estis imagita kiel dokumento de la tuta Esperanto-Movado, ĉar ekzistis eta espero, ke la posthamburga gvidantaro de UEA, sub la premo de la bedaŭrinda, multrilate eĉ katastrofa situacio en tiu organizaĵo, utiligos la ŝancon por rekonduki la Asocion al la vojo, kiun ĝi forlasis en 1974. La rifuzo eĉ nur informi la Komitaton kaj la Kongreson pri la propono apogi la Manifeston, montras ankoraŭfoje ĝis kiu grado eĉ la bonintencaj esperantistoj en la gvidantaro (almenaŭ kelkaj troviĝas en la Komitato), tute senkonsidere al siaj personaj politikaj konvinkoj, troviĝas en la ĉenoj de la partipolitikaj fortoj en la kadro de la nuna UEA. Samtempe la rifuzo plian fojon klare konfirmas la ĝustecon de la faktoj, analizoj kaj antaŭvidoj en *Hamburgo en Retrospektivo*.

En tiaj kondiĉoj la Manifesto fakte ne spegulas la starpunkton de la tuta Esperanto-Movado, sed prezentigas sole kiel honorinda dokumento de la tradicia, partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado. Venos iam la tempo, kiam dank' al kuraĝaj batalantoj kaj iliaj subtenantoj — certe ne dank' al senvertebraj kliniĝantoj antaŭ la perforto — la homaj rajtoj estos observataj ĉie en la mondo. La subskribintoj de la Manifesto fieru, ke per sia apogo al nobla celo ili kontribuis kaj espereble plu kontribuos al la proksimigo de tiu tempo kaj tiel, samtempe, al la kreo de kondiĉoj por plena ekfloro de la Internacia Lingvo kiel potenca instrumento de internacia komunikado kaj grava faktoro de internacia kompreniĝo en paco kaj libereco.

Ivo Lapenna

LASTMOMENTE PRI LA MANIFESTO 77

Apoganto de la Manifesto 77 en orienteŭropa lando ĵus sciigis, ke la Manifesto estas tradukita en la koncernan nacian lingvon, elvokis «grandan entuziasmon» en la tiulanda komitato por homaj rajtoj kaj nun cirkulas tra la lando. Li ankaŭ informas pri la unuaj reagoj de neesperantistoj, ĉiuj tre laŭdaj. «Kia trafa jura dokumento», eksklamis juristo post kiam la teksto estis legita en malgranda rondo; «kaj kia beleco», aldonis alia; «bonega sukceso ankaŭ por Esperanto», skribis tria, ktp. La skribinto aldonis pluraj novajn apogajn subskribojn.

Fakte, la enhavo de la Manifesto restos aktuala ankaŭ en 1978, tre verŝajne (kaj bedaŭrinde) ankaŭ en la postaj jaroj. Nenio malhelpas, ke firmaj apogantoj imitu la supran ekzemplon, traduku la Manifeston en sian nacian lingvon kaj maksimume diskonigu la enhavon.

LA POSTMARKKOLEKTADO

En 1977 mi vendis la alsenditajn poŝtmarkojn por entute mil danaj kronoj = 13.000 pesetoj, kiun monon ricevis «Horizonto».

Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj tiel kontribuis al la ekonomio de «Horizonto». Precipe ni dankas al fraŭlino *Sirkku Koivu* finlando, s-ro *X* Ĉeĥoslovakio, s-ro *García Breque* Argentino, d-ro *Vedrine* Francio kaj d-ro *Jean L. Tortel* Francio.

Kune kun la poŝtmarkleteroj ofte venas kuraĝigaj bondeziroj de la tuta mondo, kiujn ni tre dankas. Sendu daŭre viajn uzitajn poŝtmarkojn al s-ro *Peter Zacho*, *Amosevej 5 A*, *2700 Brønshøj, Danlando*.

La 13-an de januaro 1978 la Londona Esperanto-Klubo festis la 75-jaran datrevenon de sia fondiĝo. Laŭ la peto de la redakcio, s-ro H. W. Holmes, dum multaj jaroj prezidanto de la Klubo — Honora Prezidanto de UEA de 1964-1974 — verkis koncizan artikolon kun kelkaj informoj el la historio de la Klubo. Jen ĝi:

EL LA HISTORIO DE LA LONDONA ESPERANTO-KLUBO

La Klubo estis fondita la 12-an de Januaro 1903 sed la unuaj paŝoj estis faritaj jam en 1887 kiam artikolo en Londona ĵurnalo «Pall Mall Gazette» raportis novan lingvon «Internacional» «inventita» de D-ro Esperanto. La redaktoro estis S-ro W. T. Stead kiu en 1890 fondis «Review of Reviews» en kiu li regule apogis Esperanton.

Sendube la laboro respondi al la leteroj kaj demandoj kiuj sekvis pro la artikoloj falis sur lian sekretariinon F-ino E. A. Lawrence. Ŝi oficis en la Klubo ĝis 1921.

S-ro Harold Bolingbroke Mudie estis la unua sekretario. Li poste fariĝis la unua Prezidanto de UEA. W. T. Stead estis la unua Kluba kasisto kaj finance garantiis la eldonon de la unua esperanta gazeto en Britujo «The Esperantist».

Laŭ la tradicio establita de la unuaj pioniroj la Klubo kunvenas ĉiusemajne kaj ne ĉesis tion fari dum du mondmilitoj kaj bombardoj de Londono.

Ĝi ĉiam presigas programon, kaj alilandaj vizitantoj envie parolas pri la kvalito kaj diverseco de la eroj.

Oni parolas nur Esperanton do, en la vortoj de antaŭmilita rifuĝintino, «mia impresio kiam mi eniris la Klubejon estis ke mi venis hejmen, inter amikaron, kaj tiu impresio restis daŭra».

La Klubo foje entreprenis gravajn taskojn por la movado. En 1907 post la 3-a Universala Kongreso ĝi gastigis D-ron kaj S-inon Zamenhof kaj sukcesis aranĝi, fare de la Lordurbestro de la antikva Civito Londono, en la prestiĝa Guildhall, la akcepton dum kiu li parolis pri patriotismo. La Klubo respondecis pri la du Universalaj Kongresoj en Londono, postkongreso, kaj antaŭkongreso en kiu 565 partoprenis.

Por sia ora jubileo ĝi aranĝis internacian semajnfinojn.

Dum la festo por la 75-a datreveno okazinta la 13-an de januaro, ĥoro dolĉe kantis, oni parolis pri ĝia historio, kaj anino bakis bongustan kukon sufiĉe grandan por ke ĉiu el la 80 ĉeestantoj manĝu pecon.

La Klubo ne vivas en la pasinteco. Kelkaj tre agemaj anoj fondis Grupon V kiu celas meti Esperanton en la radion. Ili produktis kurson sur profesiaj bendoj kaj kasetoj aparte, por ke ĝi estu uzata per interna radio en universitatoj, kaj kolektis £ 1.000 por premioj. La kurso estis tradukita en la italan kaj islandan lingvojn kaj estas uzata en Usono, Aŭstralio kaj Sud-Afriko. Aliaj landoj jam interesiga.

La Klubo provizas en la granda metropolo terenon sur kiu Esperanto estas vivanta lingvo.

H. W. Holmes

Intervjuo en la Brita Radio okaze de duobla jubileo

La 30-an de januaro 1978 Prof. D-ro I. Lapenna havis longan intervjuon, preskaŭ kvarhoran, en la elsendo por Jugoslavio de la Brita Radio. La intervjuo estis el la kroata lingvo. Ĝi estis ligita al la 75-jara datreveno de la Londona Esperanto-Klubo, pri kio la londona gazetaro publikigis sufiĉe da informoj, kaj ankaŭ okaze de la 50-jara datreveno ekde la jaro, kiam la intervjuito ellernis la Internacian Lingvon kaj ekaktivis en la Esperanto-Movado.

LA NUNTEMPA ETIKO

En la fino de la XX-a jarcento la tuta mondo vivas sub la influo de iu doktrino, kies batalema principo iom post iom anstataŭas la ĝisnunan tradicion de interfrata hom-ama idealo.

Tia principo estas tute fremda, eĉ kontraŭa al la fama, tiel nomata «interna ideo» de la Lingvo Internacia, kiun kun tiom da fervoro proklamis d-ro L. L. Zamenhof tuj en la 2-a Universala Kongreso de Genevo (1906): «*Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo*».

Kompreneble, tia principo de batalema per sia perforta memdinamiko nepre trovis favoran grundon ĉe la gejunularo, kiu ĉiam en ĉiu generacio pretas renversi ĉion, kion ĵus faris la gepatroj.

Sed — kio plej gravas — tia principo de evolucio, almenaŭ origine laŭ la aŭtoro mem de la doktrino, fakte devojiĝis al revolucio sub la efiko de la strategia pripensado de Clausewitz: «*Milito rezultas ne nepre el invado sed el la defendo, kiun la invadanto kontraŭstarigas al la invadanto*». Alidire: iel same kiel la Helenoj ĉevale enirigis soldatojn en Trojon, tiel la nova agmaniero de nia jarcento, la nuntempa kvazaŭ-etiko admonas vin enŝovi en iun ajn, kiu metas obstaklojn sur vian vojon tiajn ideojn, kiuj malmarmas ja lian defendon.

Kiel deklaris Winston Churchill ĉe la fino de la 2-a Mondmilito: «*La imperioj de morgaŭ estos tiuj de la lingvo kaj spirito*». Kaj efektive temas unue pri manipulado de mensaj kaj sentaj fortoj por allogi kaj alglui homojn; poste, kontraŭ la demokratia principo de alterneco trudiĝas uzo de cenzuro, se ne de fizikaj fortoj, por la konservado de la povo. Verfakte, tio estas nova, hipokrita formo de la potencovolo; kaj ĝuste ĉar ĝi konsistas el mensaj kaj sentaj manipuladoj, multaj homoj — eĉ ofte nekonscie — estas trafitaj de la intelekto «opiuma» doktrino.

—oOO—

Tion oni nomas favore «la psikologia komunikado» kaj malfavore «la psikologia milito»; sed kiel ajn oni nomas ĝin, kio karakterizas ĝian strategion kaj taktikon?

Strategie ĉio komenciĝas per subfosa agreso, kies ĝenerala celo estas psikologie izoligi la estrojn per demagogia depostulado: do, sur la politika kampo de la ŝtatoj la laŭleĝajn instancojn disde la popolo per ekspluatado, eĉ estigado, de konfliktoj kaj krizoj en ĉiaj medioj, la polica kaj justica, la instrua kaj informa, la armea kaj religia, la sindikata kaj universitata; se temas pri neregistara asocio, tiam oni penas kontraŭstarigi la membraron al la gvidantoj per cirkulera aŭ gazeta sistema kritiko (kiel dum pli ol dek jaroj faradis «Heroldo»!). Kaj kiam maturiĝis la krizo, sekvas la revolucia renverso: sur la politika kampo tiam plej ofte stariĝas unu tiel nomata «liberiga registaro» destinata por superregi la popolamason, kiu fariĝas unue malfida, baldaŭ malmika kaj fine tute fremda je iu ajn laŭleĝa instanco; ĉe neregistara asocio oni plej lerte subfosas la prestiĝon de gvidanto por flati kaj elstarigi iun ajn supozeble kapablan renversi la gvidanton (kio prilumas la eventon de la Hamburga Universala Kongreso).

Post la strategio ni ekzamenu la taktikon.

La psikologia aŭ ideologia milito, kiu nuntempe furoras tra la mondo, taktike uzas aliancojn kaj kompromisojn, traŝoviĝon kaj nukleumadon, kaj kion oni ĝenerale nomas «la transmisiaj rimenoj». Aliancojn kaj kompromisojn plej ofte simbolas ja «etendita mano», kiu abrupte ponardas en la dorson. Kiom da aliancoj aŭ asociitoj finiĝas deklaritaj «*perfidintoj*», se ne forĵetitaj tra fenestro kiel en la ĉeĥa historio! Traŝoviĝo kaj nukleumado renovigas propredire la ruzajon de la fama Troja ĉevalo: kriptomembroj per tia rimedo kaŝe disvastigas propran agadon en la sino mem de la kontraŭa medio. Same la tiel nomataj «*transmiaj rimenoj*» estas iuj ajn organoj aŭ homoj, kiuj transsendas kaj redisvastigas la propagandajn sloganojn: tiaj povas esti sindikatanoj en laborista medio, gvidantoj kaj pastroj en instrua kaj religia medioj, studentaj agitatoj kaj instruistaj partiuloj en universitata medio, sed precipe en ĵurnalista medio agantoj, kiuj informas sed ankaŭ misformas per amalgamoj kaj misprezentoj ekzemple de veraĵoj kun supozoj. Cetere la «rimenoj» povas esti konsciaj aŭ nekonsciaj!

La taktikon oni povas do resumi per formulo: A × P × O, en kiu A signifas «*agitadojn*», P «*propagandon*» kaj O «*organizadon*».

Agitadoj — en ŝtato tio estas strikoj, manifestacioj, unuvorte perfortoj per kiuj oni «*kreas eventon*»; — en UEA tio manifestiĝis per la deklaracio de Tyresö, la ripetitaj petolaĵoj de TEJO en Vieno, Graz kaj Londono, la artefarita malordo estigita en la Centra Oficejo; tion akompanis pluraj aliancoj, kiel tiuj de la komplotintoj kun la reprezentantoj de la socialismaj landoj, ankaŭ kompromisoj eĉ kompromitiĝoj, kiel tiuj de pluraj membroj de la estraro elektita en Londono.

Propagando — jen kio estas klara per si mem: orienti la prezenton de l'evento; kion faris en la movado pluraj gazetoj, kiel «Brita esperantisto» kaj precipe «Heroldo»; tion

akompanis ankaŭ pluraj cirkuleroj, kiel inter aliaj tiuj de Moritz kaj Corsetti, eĉ anonimaj telegramoj destinitaj por prove esti krizon inter la amikoj de la «*faligota prezidanto!*»

Fine, organizado — tio estas ripetadi saman eventon en gazetaro, radio- kaj televidostaciaro tiel ke ĝi fariĝu la sola evento, pri kiu ĉiu parolas: la evento kiu obsedas! aŭ estigi tian eventon en pluraj lokoj samtempe. Kaj kompreneble tiucele necesas kunvenoj preferinde sekretaj! En la movado tio efektiviĝis dum la kvin antaŭaj jaroj: tio aparte klarigas la ekziston de la tiel nomataj «*Konsultigoj de la socialismaj landoj*», kiuj ekestis nur ekde 1970, tiel jam disdividante la movadon en du partojn, tiun de la socialismaj landoj kaj tiun de la neorganizitaj (kiel la socialismaj) landoj; kaj tio klarigas ankaŭ la ekziston de la tiel nomataj «*sekretaj*» kunvenoj (de TEJO kaj aliaj) precipe en Kassel kaj Berlin.

Unuvorte, ĉi tiu taktika sistemo de estigo kaj ekspluatado de konfliktoj ĝis krizo, kiu cetero memorigas pri la iama romana moto: «*Divide ut imperes*»¹, kondukas al ia totalismo de «*ideokratio*» laŭ la vorto de Raymond Aron des pli rapide, ke ĝin akompanas ia superregado de la informiloj. Unu el ĝiaj difinoj estas jena: «*ĝi estas persistega lukto, sanga kaj nesanga, perforta kaj paciga, milita kaj ekonomia, pedagogia kaj administra kontraŭ la fortojn kaj tradiciojn de la malnova mondo*». Nu, tia difino havas nomon: ĝi estas la leninismo, kiun perfektigis Stalin, Hitler, Mao, Castro... ktp.

—oOo—

Kiom fremda, efektive, eĉ kontraŭa al tia sistemo, kiu pli malpli invadas la socian konscion kaj nekonscion de ĉi tiu jarcenta fino, estas la tiel nomata «*interna ideo*»: ne entrudi sin en la vivon de la aliaj; kiun ideon d-ro L. L. Zamenhof fojfoje nomis ankaŭ «*neŭtrale-homa moralo*», eĉ «*sendogma etiko!*»

«*Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis — li deklaris — sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn: «Tion mi postulas» aŭ: «Tion mi deziras». Neniam mi provis altrudi al vi mian volon... Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: «Kiu pli laŭte krias, tiu estas prava».*

Kiom lia sinteno estas ja malproksima de hipokrita doktrino, kiu pretendas bazi sin sur sciencaspektaj argumentoj por altrudi sin al ĉiuj!

«*Mi vidas en ĉiu homo nur homon, — plue proklamis d-ro L. L. Zamenhof — kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Cian ofendon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.*»

Laŭ la prilumo de tia deklaro pri nediskriminacio eĉ se nur pro aparteno al «*alia socia klaso*», (kiu deklaro nepre implicas solidaran fratecon inter ĉiuj homoj, rajtan egalecon inter ĉiuj grupoj kaj plenan liberecon pri la cirkulado de la ideoj kaj homoj), oni bonvolu kompari, kiu principo regis la elekton de la UEA-komitatoj C en Hamburgo, kiam la kandidatoj estis selektitaj ne simple «*laŭ persona valoro kaj agoj*», sed nur laŭ aparteneco al la politika koterio, se ne partio, kies sola sekreta interkonsento estis en la momento nur forpeli unu homon konsideratan kiel la «*bastiono de la neŭtraleco*».

El la prelego «*ETIKAJ VALOROJ DE LA ESPERANTISMO*»² farita de Jean Thierry en la 3-a Konferenco de Humlebæk.

¹ «*Divide ut imperes*» — Dividu por superregi — Maksimo de la Roma Senato, de Luiso la XI-a kaj Katarina de Mediĉoj en Francio, eĉ precipe de Makiavelo en Italio.

² Pri la etikaj valoroj de la esperantismo relegi en «*HORIZONTO*» n.º 8, p. 25.

NEKROLOGO

Dro. HANS WESTENBERGER

La 3-an de februaro 1978 forpasis en Fulda (Germanujo), s-ano d-ro Hans Westenberg, studkonsilisto, en aĝo de 94 jaroj. Li lernis Esperanton jam en 1905. Pli ol ses jardekoj li estis kiel kursgvidanto, estrarano, prezidanto kaj fine honora prezidanto fide-la kunlaboranto de la Esperanto-Societo Fulda.

Li pace ripozu!

«ESPERANTO KIEL KONGRESLINGVO»

Kial ni ne provus disvastigi la nocion de «Esperanto — Kongreslingvo»? Plej multaj homoj ne bezonas internacian lingvon. Sed multaj aliaj homoj penas en kongresoj, internaciaj asembleoj kaj ĉiuspecaj seminarioj, renkontiĝoj kaj simpozioj, kie ili devas pro l' multlingveco diveni multon en ofte ĵargonita fremda lingvo. Multajn teknikajn kaj kulturajn vortojn ili ekkaptas pro ties internacieco sed la frazaj ŝlosilvortoj restas fremdaj, ĝenaj, obskuraj. Plej ofte necesas rezigni, kiam konversacio kun fakulo jam montriĝis kiel interesa aŭ eĉ necesa...

Kial ni ne provus disvastigi la doktrinon, ke necesas en la evoluintaj landoj — do ne nur en Eŭropo, sed ja tra l' tuta mondo — ke ĉiuj infanoj lernu Esperanton kiel unuan lingvon, kiu ebligas al ili unue pli bone koni la mekanismon de l' propra gepatra lingvo, kaj due pli facile ekkoni kaj mastri alian fremdan lingvon; kaj ankaŭ ke ĉiuj infanoj lernu almenaŭ unu alian nacian lingvon krom la propra, kaj ke tiu alia lingvo estu prefera la lingvo de l' plej najbara lando, kun kiu ili plej verŝajne do devos rilati? Dume al la pli sukcesaj lernantoj estus allaseble, ke ili lernu duan kaj eĉ trian nacian lingvon.

Kial ni ne starigus ĝeneralan klerigo-programon por la lernejoj-infanoj? En tiu programo ĉiuj infanoj je aĝo difinota de l' pedagogoj lernus Esperanton dum unu jaro; ili lernus ĝin profunde kaj intense, ni diru dum ok horoj semajne kun la celo plene ĝin mastri skribe kaj parole kun facileco, eleganteco kaj sperteco. Poste estus rezervitaj 3 horoj semajne en la sekvaj jaroj de lernado en kiuj oni ne plu lernus Esperanton mem, sed per Esperanto oni konatiĝus kun la diversaj kulturoj de l' mondo. Ekzemple, okcidentano lernus el la kulturo de Oriento kaj konatiĝus dank'al majstraj Esperanto-tradukoj kun la antikvaj aziaj ĉefverkoj: ĉi kiuj restas eterne validaj. Ili ankaŭ konatiĝus — depende de l' naciaj lingvoj kiujn ili aliflanke lernus — kun la ĉefverkoj de aliaj naciaj lingvoj de Eŭropo: tio estus honorigo al, ekzemple, la skandinavaj aŭ al la finna aŭ al la hungara literaturoj kaj ankaŭ al multaj aliaj, kiel la islanda, la celta aŭ la kataluna, kiuj regule mankas en la programoj tutsimple pro la lingvaj baroj...

Tio kompreneble estas nur tri senrespondaj demandoj, kiujn mi surpaperigis okaze de l' jarfino en mia soleco kaŭzita de l' tradicia preparo de l' Silvestra Vespero — por uzi ne francan sed ja germanan esprimon —. Tamen ŝajne la respondoj jam ekzistas, se ne konkrete kaj faske do almenaŭ dise, kaj ne potencigitaj. Eble la Nova Jaro trovos kuraĝulon por arigi ilin kaj uzi ilin kiel novan armon por disvastigo de nia lingvo...

D-ro André Albault

EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAĴOJ

KUNVENO DE IEAJ EN JACA

Laŭ la ĵusa decido de la Plenuma Komitato de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, la jara ĉefkunveno de la Asocio okazos en Jaca en la kadro de la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. La precizajn tagon kaj horon fiksos la Organiza Komitato kaj informos ĝustatempe. La tagordo de la kunveno kaj aliaj detaloj estos komunikitaj al la membroj kaj abonantoj de Internacia Jura Revuo per aparta cirkulero.

La Plenuma Komitato de IEAJ invitas la membrojn kaj ĉiujn juristojn, kiuj ankoraŭ ne membriĝis, partopreni la kunvenon kaj tiucele kiel eble plej baldaŭ aliĝi al la Konferenco. Aliĝilojn kaj aliajn informojn oni povas ricevi de la Organiza Komitato je la adreso: I. Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza-1, Hispanio.

La Plenuma Komitato

Londono, la 27-an de februaro 1978.

Al la Redakcio,
Horizonto,
Zaragoza

Estimata kaj kara Fraŭlino Gastón,

Kun agrabla surprizo mi legis en la lasta n-ro, ke kelkaj miaj geamikoj kaj kunlaborantoj rememoris pri la fakto, ke en 1978 kompletigas 50 jaroj ekde kiam mi ellernis la lingvon kaj tuj ellaboris por ĝia disvastigo. Mi estus mal-sincera, se mi dirus, ke mi ne estas kortuŝita pro via intenco aranĝi apartan renkontiĝon de geamikoj kaj kunlaborantoj en la kadro de la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Jaca por memori tiun datrevenon. Mi nur tre petas vin kaj la aliajn iniciatintojn fari la aranĝon kiel eble plej simpla kaj modesta. Renkontiĝo en amika rondo de sinceraj kaj sindonaj esperantistoj donos al mi la plej grandan ĝojon kaj abunde kompensas la malagrablaĵojn kaj sendankemon, kiujn mi spertis en la lastaj jaroj en difinitaj rondoj de la Esperanto-Movado. Se, krome, mia 50-jara seninterrompa kaj, mi kuraĝas diri, sindediĉa laboro por la Internacia Lingvo povos esti iom inspira por la aliaj, precipe por la juna generacio de esperantistoj, la kompenso por tiu longa aktivado estos kompleta kaj por mi la plej feliĉiga.

Mi tre esperas, ke mi renkontos en Jaca multajn el miaj nunaj kaj antaŭaj kunlaborantoj ekde la studentaj jaroj. Al ia invito de la Organiza Komitato mi aldonas mian personan inviton aliĝi senprokraste al la Konferenco en Jaca kaj partopreni ĝin.

Kun esprimoj de alta estimo, tre koraj salutoj kaj ĝis revido en Jaca,

Sincere via,
Prof. D-ro Ivo Lapenna

LASTMOMENTA INFORMO

Laŭ peto de la Organiza Komitato de la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, Profesoro D-ro Ivo Lapenna, la plej granda Esperantlingva oratoro, aŭtoro de *Retoriko* kaj de aliaj gravaj verkoj, antaŭa prezidanto de UEA, konsentis fari la inaŭguran paroladon pri unu el la ĉeftemoj de la Konferenco sub la titolo «Neŭtraleco kaj Humaneco».

Sur la foto Prof. Lapenna dum la inaŭgura parolado de la UK en Vieno (1970).



Por muzik-amantoj...

La aŭtoro de la artikolo verkis franclingve la solan libron dediĉitan al la muzik-amatoro kiel tia (en la nobla senco de la vorto) kaj ne kiel «redukto-kopio» de profesiulo: «Faire de la musique» (ludi muzikon); por la venonta jaro li preparas daŭrigon sub la titolo: «Leçons de piano ou leçons de vivre?» (lecioj ĉu pri piano aŭ vivo?); kiu libro fakte pliprofundigos la problemojn de amatoreco. Li regule «produktas» ankaŭ elsendojn el «France Musique» per registritaj muzikaĵoj de amatoroj. Li cetere demandas sin kaj la legantojn, ĉu la amatoreca problemo pri muziko vekas saman interesigon en multaj landoj.

NECESO KAJ LIBERO

«Estas libero la neceso komprenita»

— HEGEL —

Ciun fojon renoviĝas en mi unu ĝojo tiel nova kiel la spertata esper-freŝeco ĉe la unuaj burĝonoj de printempo malnova kiel la mondo kaj ŝajnanta la unua. Mi rigardas vivi sur la klavaro tiujn etajn manojn¹ preskaŭ senmovajn sed intense aktivajn; mi observas kun atento iliajn tremetojn anoncantajn agon. Tra ĉiuj senseblaj signoj eligantaj el la fingroj, okuloj aŭ vizaĝo mi sekvas la vojiron de l' nervo-flukso ekiranta de la decido kaj ĝisiranta zorgeman efektivigon.

Mi detenis min altrudi en la komenco unu el tiuj «manpozicioj» de truddevido, kies respekton inhibiciantan ĉian liberon, ĉian fizikan kaj mensan senĝenecon oni tro ofte provas trudi kun bona konscienco. Mi «lasis fari»; mia neofito per stranga maniero ekiris sur la klavaron almeti la fingrojn kvazaŭ porbrasikajn portilojn en teron. Mi ne brovomovis, sed dank'al la nebona rezultato de la sperto, kiun provi necesis lasi, mi povis sugestii, ke eble ekzistas pli tuje efikaj manieroj «tuŝi» pianon. Restos ja ankoraŭ multo farota, por ke mia eta pianisto «bone» tenu sin; bone — tio ne volas diri laŭ la dogmaj kanonoj, sed laŭ la memkonsentoj, kiujn li iom post iom malkaŝos, poste plifortigos, inter sia propra morfologio kaj sia volo kreiva je belo.

Car, nur iom post iom per sugestoj, proponoj, ekzemploj mi helpas al li progresi konscii pri siaj propraj fiziologiaj rimedoj; sed — male — ekde la unua sekundo mi provis igi lin atentema pri la muzika enhanceco de la sono, kiun li eligis aŭ povus eligi. Ekde la unua sekundo: ĉar ne estas atendenda unu Tago malproksima kaj hipoteza, por ke la muziko retrafu fine «teknikajn» rimedojn ellaboritajn en malpleno. Ekde la unua sekundo la muziko devas esti la esenca prizorgo; ĝi ne devas vidi substitui al si la akiron de ia mekaniko, kiu povos honori sin per la nomo de tekniko nur, se dekomence — kaj ĝis la supro — ĝi estos daŭre, senĉese kondiĉita per la havigotaj muzikorezultoj, determinita per ties elserĉoj. Tio restas vera jam de la elementegeco ĝis la superega rafinaĵo.

Kaj mia eta vireto (tio povas esti ankaŭ mia eta virineto) per ĉiuj siaj fortoj ankoraŭ ne kunordigitaj provas rekrei la emocijn, kiun mi antaŭsentigis al li en tiu peceto de populara kanzono (el kvin muziknotoj kaj per du manoj unisone). Hezitoj, eraroj; la nerva reto de «distribuo» ankoraŭ ne estas formita: necesos laŭgrade ekpreni super ĝi la regadon. Nunmomente mi devas por mia lernanto lasi lin fari kun plena egalhumoro, ĉar neniam lia peno estos pli intensa por plej bone malaltigi (eligante la volitan sonon) tuj kune du fingrojn, kies movon la cerbo ne parigas... Ĉe la daŭra serĉado de la muzika signifo li vidos ja tago post tago — al tio oni lin instigos — ke la sonelserĉo ne povas esti fruktodona sen la elserĉado de celtaŭgaj fizikaj rimedoj por estigi ĝin.

Evidente mi devas al mia lernanto instrui, ke la kvaronsilento estas la silento de la kvaronoto, kaj same multajn aliajn nociojn aŭ kodigitajn signojn; mi devas ankoraŭ pli helpi lin por ilia encerbigado, ilia laŭgrada asimilado, sen kiuj tiu libereco estus nur ia sterila kaj steriliga «lasi fari». Sed kion reprezentas la plej subtilaj eksteraj akiroj? Kion ili estas sen tiu daŭra ekrespondeco, sen tiu laŭmezura formado de fortoj, kiuj povas veni nur de li mem kaj kiuj estiĝas — fortoj de l' korpo same kiel de l' menso, de l' gustoj same kiel de l' amo — ekde tiuj provhezitaj komenciĝoj?

Eble aliaj trudrimedoj ebligas «dresi» instrumentistan lernanton; sed por atingi, ke la fekundaj povoj de la muziko sorbiĝu ĝis en la fibroj de lia animo, tiam (pri tio mi estas ja certa) ekde tiu fragila komenco ĝis la supro de la arto nenia pedagogio valoras tiun de la libero fondita sur la komprenita neceso.

Michel BRIGUET

¹ Temas pri manoj de piano-lernanto.

PRINCIPA DEKLARO DE LA REDKACIO

La redakcio kaj ĉiuj kunlaborantoj rigore atentis, ke la faktoj prezentitaj en artikoloj, informoj kaj aliaj tekstoj estu absolute ĝustaj. Se malgraŭ la plej sincera deziro strikte observi tiun principon, tamen hazarde enŝoviĝas iu eraro (ĝis nun tio ne okazis), tiam la redakcio, konforme al demokrata ĵurnalisma etiko, nepre publikigas korekton. Kvankam klera polemiko estas vigla kaj tre utila literatura formo, kiu en la historio de la kulturo tre helpis kaj plu helpas al klarigo kaj disvastigo de ideoj, kaj kiun tial *Horizonto* neniel evitas, tio tamen ne estas «polemiko», sed tutsimple realigado de la principo servi al la vero. Tasko des pli grava en la nuntempa Esperanto-Movado, en kiu abundas malĝustaĵoj, misprezentoj kaj prisilentoj, do falsaj, sen ebleco publikigi korektojn.

Pro la cenzurado de la organo de UEA kaj de pluraj satelitaj periodaĵoj, la redakcio enkondukis tiun ĉi rubrikon. En ĝi aperas leteroj kaj aliaj informoj, kiujn oni ne povas legi aliloke, ĉar la periodaĵoj, al kiuj ili estis adresitaj, rifuzis la publikigon por kaŝi la veron. La redakcio ne publikigos eventualajn reagojn je tiaj kontribuadoj, kiuj entenas objektivan prezenton de faktoj kaj kiuj estis originale adresitaj al aliaj instancoj aŭ gazetoj, sed kiuj la koncernatoj rifuzis publikigi, kvankam ili tion devis fari, eventuale kun siaj replikoj. Permesi al la cenzurantoj utiligi la valorajn paĝojn de *Horizonto* por publikigi en ĝi tion, kion ili povis kaj devis aperi en siaj gazetoj, ne estus demokrateco, sed perfido de la propra baza celo — servi al la vero — kaj krom tio neracia malŝparo de spaco.

El la franca agad-grupo C.E.P.E.....

¡UNU KONSCIENCA AGMANIERO!

Ĉe la komenco de la jaro CEPE sendis al la redaktoro de «Franca Esperantisto» jenajn anoncojn, intence tre koncizigitajn pro la malgrandeco de la bulteno:

«La 29-an, 30-an de aprilo kaj 1-an de majo 1978 CEPE organizas esperantistajn studtagojn kun la partopreno de profesoro Ivo Lapenna. Petu informojn de CEPE, 5 rue Léon Cogniet, 75 017 Paris.»

«De la 22-a ĝis la 29-a de julio 1978 en Jaca. Centraj Pireneoj, Hispanio, okazos la IV-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Petu informojn de f-ino Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha., Zaragoza-1. Hispanio.»

Ja ĉu anoncoj povas esti pli mallongaj sen fariĝi nure enigmaj?

Nu, la 12-an de januaro 1978, la redaktoro Hervé Gonin respondis: «Anoncoj, kiujn vi sendis, aperos en venonta numero de F.E...».

Sed kiam aperis la numero, ni konstatis tian mallongigon, ke la anoncoj fariĝis preskaŭ senutilaj: efektive mankas la adresoj, al kiuj sin turni por informoj, kaj — ne atendite! — la studtagoj estas anoncitaj «en Parizo», dum ili okazos ja en «Lyon»... Fine estis cenzurita la mencio «kun la partopreno de profesoro Ivo Lapenna».

Ni lasas al ĉiuj honestaj homoj la zorgon prijuĝi tian redaktoran ag-manieron, kiu certe ne estas senintenca.

SUKCESA KURSO DE ESPERANTO

Ĉe la Labora Universitato de Cheste, pli ol 300 junuloj el pluraj hispanaj regionoj, lernas Esperanton.

Gvidas la kurson S-ro Félix Navarro, instruisto apartenanta al la Esperanto-Grupo de Valencia (Hispanujo). La lernantoj, kiuj sekvas la kurson kun granda intereso, estas dividitaj en grupojn.

De ĉiam, la valencia regiono estis kaj restas bona grundo por la Internacia Lingvo. Sekve, tiu nova kurso estas esperplena promeso por daŭra vivado de Esperanto.

Joan Maragall, fama poeto de la «Parolo Viva»
 Barcelona (1860-1911)

Libera traduko el la Kataluna Lingvo

LAŬDO-KANTOJ AL LA VIRGULINO DE NURIA

Virgulin' de l' val' de Núría
 ĉirkaŭata de solecejoj,
 senmova, Vi, en la mallumo,
 kaj en viaj oritaj vestoj,
 Vi aŭdas la eternan kanton
 de la vento kaj de l' tempestoj;
 Virgulin' de l' val' de Núría
 al Vi are la urboj venas.

Ili iras al Vi malcertaj
 tra inter la altaj kvietoj
 kaj laŭ nekonataj vojspacoj
 de l' grandaj montĉenoj dezertaj.

Riverojn ili trovas naskiĝe
 irantajn en regnojn paŝtistajn,
 kaj gregojn la brutoj tintantaj
 kiuj paŝtas sin tute lante.

Suprojn ĉielajn ili iras
 sur la nudegaj montokrestoj...
 La neĝoflokoj krude brilas
 per blankajoj ne mortigemaj.

Imponajn ili pasas montoĉenojn
 kie, de l' vaku' pro la zorgoj,
 ili trovas, ĵus kliniĝinte
 funden de la serenaj valoj,
 la blurigardojn de l' lagetoj.

Kaj de la vent' sub la furio,
 de malestimo por la sensoj,
 kun la sensoj en svenostato,
 al la mallum' ili descendas
 de via valo de Núría,
 ĉirkaŭata de solecejoj.

Jen ni, ĉi tie, Virgulin' kruda,
 malprecize ŝirmon serĉantaj
 en la mistera lok' enklava
 de via kapelo malluma.

La nokto falas ĉien ajn...
 kor' nia iĝas psalterio
 antaŭsentante la misteron
 sanktan, tremigan de voĉ' via.

Kial vi rigardas nin, Virgulin' sankta,
 per okuloj tiaj, tiel malfermitaj?
 havigu al ni l' emocion
 de l' malnovaj mirakloj okazintaj!

Punsuferigu senson nian
 pro tiom forgesitaj febroj! ⁽¹⁾
 Donu animon al la tenebroj!
 Donu de l' Nokt' al ni la fidon...

Ĉar morgaŭ, ĉe la sunleviĝo,
 ni l' flugon reprenos denove
 laŭ la fascinaj montokrestoj,
 kaj la vojojn al la kaskadoj
 ni sekvados de sun' al suno... ⁽²⁾

Tiuj kaskadoj, kiuj staras
 en malproksim' daŭre kantantaj,
 dum ili plektas kaj malplektas
 sian blankaĵon resonantan
 supre de l' nigra mur' giganta.

Kaptitaj de nigraj altaĵoj,
 surdigitaj de l' akvobruo,
 ni descendos kiel la akvo
 laŭ la solecaj montogorĝoj
 tutabismaj kaj malvarmetaj.

Kiam ĉe la lasta pordeto
 la tuta ĉielo larĝiĝos,
 kun nova kontento ni vidos
 l' ebenetendaĵon pli bela
 kun la verdo sur ĝi kreskanta.

.....

 Vintre, kiam neĝas kaj pluvas,
 kaj la urb' denove moviĝas
 kun bril' de revoj kaj furio,
 niaj okuloj blindumitaj
 ekvidos, tien en mallumon,
 la senmovan Virgulinon de Núría
 ĉirkaŭatan de solecejoj.

Trad. el la kataluna lingvo, JOSEP VENTURA I FREIXES

⁽¹⁾ Febroj = Signifas tie ĉi: Vivajn kaj pasiajn
 ekscitiĝoj pro temperamento aŭ mo-
 ralaj kaŭzoj.

⁽²⁾ De la sunleviĝo ĝis la sunsubiro.

EN FRUPRINTEMPA TAGO

Frue de vestoj bunta elpendigo.
Subite,
sur la krutaĵo kontraŭ nia korto,
la domvizaĝ aŭstera
ĝis en la koro alridetis min.
Ĉiufenestra
plenverŝo de matena or.

Tro longe postrestadis,
pro la sezonreĝimo malcedema,
tardanta frido
kaj ĉiam pli denove vintropluv.
Ĉu ekster urboj jam revenis
hirundoj de la infanaĝo?
Ho longaj kaj facilaj glitaj
dum vasta tago super akvobril,
por rekonstrui ĝisvespere
sub tegmentrandojn ombrigantajn,
aŭ ie en sekreta montkaverno,
sezonajn kotkastelojn de la ĝojo!

Finfine post laŭgrado
kaj noktoj eltirataj.

Apud ĝardenodoroj en konfuz
sur la verando ĵus ekkantis nun alie
la kakatilgeedzoj
en fera kaĝo,
kiuj la tutan vintron ame ne demetis
eĉ unu ovon.
Al nova, riĉa bluo,
tralavata de lumo kaj la briz leĝera,
jam revekiĝis
la parfumitaj florbizaĝoj
kaj pitaj voĉoj
el svaga fon profunda,
insektopopolo
ebria inter buntoj kaj la sprosaper —
mirinda miriada, gefratetoj
kiuj min samsortane ĉirkaŭloĝas
dum vagoj kaj distancoj de la dormo.

Mi pensis pri Stalino
dum tiuj dudek jaroj
kaj Hitler, la Neandertalaj
murdintoj de la poezio,

kaj multaj, multaj pli.
Dum purigistreĝimoj
ĉi ideologiaj ĉarlatanoj
per vintro kaj vipurvenen
kolorojn pelis for el ĉiu floro
kaj pro malam al sorĉoj aŭ surpriz
forligis la parfumojn en silento.
Ho sub humida ter mallume
radika atendado inter ŝtonoj!
Tiel ankoraŭ nun.
Sur vasta orienta stepo
konstante siblas glaciventoj,

por forbalai preskaŭ ĉiujn trilojn
de postrestinta najtingalkuraĝo.

Sed jen jubilo.
Post la hieraŭnoktaj nubkirliĝoj
kaj larĝa nimbo cirkaŭ lunkristalo,
ĉiuj malklaroj forsolvigis ien
kaj fine restas nur mirindo.
De horizont al horizonto
dislumas tago da kontentmurmuro
kaj buntparfume forgesigos,
dum sia tuta daŭro,
pri neĝo kaj subgraŭloj de la tondro
kaj la jarcentminaco kun glaciepok
denove dikiĝanta ĉirkaŭ niajn korojn.

Sendube plupersistas
neelĉerpebla ĝojo
ie profunde en la kozo.


Miro pri la Septembra sano,
kaj ĉi sezono ĉarme trudiĝema.
Saluton al la suno!

6.10.76
Edwin de Kock

VORTOJ NE EN PIV

kakatilo = malgranda, longvosta Aŭstra-
lia papago, simila al kakatuo.
kozo = afero, aĵo, objekto.
pita = malgrand(et)a.





Manuel Ildefonso Llano Merino naskiĝis en Sopeña la 23-an de januaro de 1898. Estas li unu el la plej gravaj verkistoj por la kono de la folkloro, la legendoj kaj la mitoj de la kantabra regiono. Li magistre, vaste, sed sobre, montris al ni rakontojn, kiuj lumis lian infanecon; legendojn, kiuj miris liajn paŝtistajn paŝojn; mitojn, kiuj timigis lian iradon sur padoj kaj vojetoj. Krome, la beleco kaj muziko de lia esprimmaniero; riĉa vortrezoro kaj mallongaj frazoj, karakterizas lian verkaron. Mortis en Santander la 1-an de januaro de 1938.

LA TIMO

de Manuel Llano

Mitoj vestitaj per sekala pajlo, per folioj de frakseno kudritaj kun herboj, per filikoj, per ŝelo de betulo, per musko kaj dornoj.

Unuj havis grandan kaptilon en kiu ili prenis la infanojn kiuj senplumigis birdojn, ruinigis nestojn, malklarigis fontojn, ŝtonumis la hirundojn kiuj forprenis la dornojn de la kapo de la Sinjoro.

Alia ludis ŝtonan fluton, kiun oni aŭdis de tempo al tempo en veprejo, en arbaro, inter rokegoj, ĉe la bordo de rojo. La sonojn de ĉi fluto, kiu imitis henon de ĉevalido, hurlon de lupo, kriĉon de vulpino, povis aŭdi la viroj kaj virinoj nur kiam ili revenis de la monto kun faskoj da ligno de nigraj kaj tordaj uleksoj, de arbustoj, de sekaj branĉoj. Nur povis aŭdi ilin la maljunaj paŝtistoj, la vojantoj kiuj havis filojn, la knaboj kiuj havis pli junajn fratojn. Alveninte hejmen ili diris al la gefiloj, al la nepoj, ke oni devas esti obeemaj, humilaj, preĝamaj, ĉar ili aŭdis la ŝtonan fluton de la homo kiu konvertis en filikojn, en cikadon, en lokuston, en karabon, en noktuon, en lampiron, en vanelon, la infanojn mensogemajn, petolajn, ŝtelemajn.

Alia havis klapon el ostoj, paŝtistan sakon plena de vipuroj, unu solan longan kaj nigran denton, manojn kun koloro de slabo kaj fingrojn serpoforme pintajn.

Kaj ĉe la bordo de la rivero, la verda lutro, maljuna kaj perversa, kun unu nigra stelo sur la frunto. La verda lutro havis sian rifuĝejon inter la radikoj de la plej korpulenta alizujo de la riverbordo. Ĝiaj okuloj estis ruĝaj kiel braĝoj, kaj ĝiaj dentoj ŝajnis vosto de trutoj. Unu fojon jare, kiam la ĉerizoj ekkoloriĝis, ĝi forlasis la riverbordon kaj kaŝiĝis en la ĉevojaj rubusoj de la valo aŭ inter la altaj filikoj de la montaj padoj. Tiam ĝiaj rigardoj konvertis en blindajn mustelojn, en milvojn sen ungoj, en vulpinojn sen dentoj, en aprojn sen tuŝoj, tiujn, kiuj mokis maljunulojn, ĝibulojn, unuokululojn, lamulojn...

Inter la altaj maizoj kaŝiĝis aliaj malbonaj mitoj, malamikaj al la infanoj kiuj ŝtonumis arbojn, birdojn, agrojn, sonorilojn de preĝejoj. Unuj havis grandajn okulojn olive nigrajn, longajn hararojn ruĝajn, rondajn manojn, sen fingroj, de koloro de voja ŝtono. Aliaj ornamigis per barboj similaj al sekaj herboj en kiuj rifuĝis blankaj birdoj kies pikoj alportis malfeliĉon, doloron, malbonan sorton por la tuta vivo...

Mitoj dikmalaltaj, ruĝvizaĝaj, kun grandaj kaj hokaj nazoj, piedoj de kapro, okuloj de aglo, vestitaj per hedero, per dornoj, per sekaj junkoj. Mitoj maldikaj kaj altaj, kun

okuloj de sovaĝkato, vizaĝo de kaprido, nudaj, flavaj, nigraj. Mitoj el fumo, el brumo obskura kiel ombroj de dikaj homoj sur la muroj de la kuirejo.

Unuj havis blujajn dentojn, brikkoloran frunton, bruston plenan de violaj dornoj, rastilformajn manojn kun feraj dentoj fulmantaj ĉe la pintoj. Alia, tute nigra, kiel muzelo de bovino, havis kapon de lupo kaj korpon de homo. Alia montris siajn verdajn tuskojn, siajn cindrokolorajn orelojn, sian ruĝan kaj larĝan kolon...

La greno estis mistero, timo, ekstremo kiam la maizoj estis altaj kaj friziĝis ĉe la paso de la vento. En ĝi loĝis ĉio malbona: la vulpo, la melo, la fantomo kiu ludis la sonorilojn de la preĝejo la noktojn de sudesta vento, la sorĉistino, la cigano, la turmentata animo... Inter ĝia murmuro, tremantaj, kuntiritaj, preĝantaj, ni kredis aŭskulti foirajn gratantajn la verdajn kanojn, buŝojn remaĉantajn lolojn, anhelojn, proksimiĝantajn paŝojn, voĉojn, gruntojn, malbonajn ridojn. La greno estis la verda kaŝejo de turpaj vizaĝoj pentritaj de la diablo...

Tusko = dentego.

El: «Retablo infantil»

Trad. Liven Dek

TROPIKA FESTENO

de Bernard Golden

Mi restis en la trinkejo *Suda Kruco* ĝis noktomezo, babilante kun Leŭtenanto Robertson, la polic-oficiro, kaj Patro Bourget, la misiisto. Ili interesiĝis pri mia esplorvojaĝo en Nov-Gvineo kaj donis al mi multajn gravajn sciaĵojn pri la indiĝenoj kaj la ĉirkaŭmedio. Ambaŭ miris, ke mi ricevis permeson de la aŭstraliaj aŭtoritatoj en Port Moresby eniri tiun ĉi ankoraŭ ne esploritan regionon.

Mi klarigis, ke kiel ĵurnalisto, mi havas multajn altrangajn konatojn kaj tiel mi povis aranĝi la aferon glate. Jam de longe mi interesiĝas pri la etnografio kaj mi venis al Papulando por verki serion da artikoloj pri homoj ankoraŭ vivantaj en ŝton-epoka kulturo. Mi tre scivolas pri la kialoj de la feroca agresemo ĉe la ĉi-tieaj triboj. Laŭ mia analizo, iliaj militoj estas neraciaj aferoj, sensenca detruo de homaj vivoj kaj pereigo de loĝejoj. La batalantoj ne celas konkeri alies teritorion, nek alproprigi al si posedaĵojn aŭ naturajn produktojn, nek subpremi unu ideologion por anstataŭigi ĝin per alia. Kaj kion diri pri la kapĉasado kaj kanibalismo de tiuj sovaĝuloj?

«Mi vere ne komprenas,» mi demandis, turnante min al la leŭtenanto, «kial ankoraŭ ekzistas batalado kaj hommanĝado en tiu ĉi regiono. Via registaro jam de jardekoj administras Papu-Teritorion. Ĉu oni ne povis elradikigi la kaŭzojn de konflikto inter la indiĝenoj kaj civilizitojn?»

La aŭstraliano levis sian glason, trinketis malrapide kaj poste respondis. «Estas tre malfacile. Ekzistas kutimoj, kiuj tute integriĝas en la vivmaniero de la homoj. Ili estas, por tiel diri, universaliaj elementoj troveblaj en ĉiuj kulturoj. Por ŝanĝi ilin estas bezonata multe, multe da tempo.»

«Eble vi pravas pri milito,» mi diris, «sed en civilizitaj landoj ne troviĝas kanibaloj.»

«Ne aktuale,» interrompis nin la franca pastro, kiu ĝis nun silente aŭskultis la konversacion, «sed ili ja ekzistis en Eŭro-

po. Herodoto, la helena historiisto, priskribis antropofagojn ĉe la popoloj de la antikveco». Bourget ekbruligis sian pipon kaj enspirante forte, daŭrigis la eksplikon. «Ĉu vi ne scias, ke en Egiptujo, arkeologoj trovis indikojn de kanibalismo dum la florado de tiu civilizacio? Kaj verŝajne ankaŭ niaj prauloj, la homoj de la kavernoj, estis hommanĝuloj. Alimaniere, estus malfacile kompreni, kial ili frakasis kraniojn kaj forprenis la cerbon.»

Mi ne havis argumentojn por superi la erudicion de la pastro, do mi silentiĝis. Rimarkinte tion, Robertson alparolis min. «Nu, ĉu vi ne vidas, ke eĉ en Eŭropo jarmiloj devis forpasi antaŭ ol la manĝogustoj ŝanĝiĝis! Krome, estas sciata, ke proteino mankas en la dieto de la triboj loĝantaj en la landinterno.» Nun mi vere ne sciis, ĉu la leŭtenanto blagis, aŭ ĉu li nur volis aldoni ankoraŭ unu etnografian fakton.

Okaze de la lasta vico da trinkaĵoj, la oficiro kaj la pastro deziris al mi sukcesplenan vojaĝon, kaj ni adiaŭis unu la alian. Ĉe la pordo, Robertson memorigis min pri la frumatena rendevuo kun la polic-ŝoforo. «Pro la paneo de nia helikoptero vi devos vojaĝi per ĵipo. La vojo estas longa kaj malglata, do ekveturu frue.»

Mi iris al mia ĉambro kaj tuj enlitiĝis, sed mi malfacile povis ekdormi pro la pensoj, kiuj svarmis en mia kapo. Kiel povas kanibaloj pravigi sian agadon? Ĉu ilia konduto rezultas de mensa primitiveco, aŭ ĉu iu diabla religio inspiras al ili tiujn fiagojn? La varmega tropika nokto kaj la longa trinkado obtuzigis mian kapablon rezoni. Mi esperis, ke post semajno en indiĝena vilaĝo, mi pli bone komprenos la sovaĝulan pensmanieron.

Je la sesa matene mi iris, ankoraŭ tre dormema, al la distrikta ĉefstabejo. Mi surpriziĝis, ĉar Leŭtenanto Robertson mem atendis min en la ĵipo.

«Envenu,» li vokis, «mi veturigos vin al la montaro. Dum la nokto ni devis sendi

la plejmulton da policanoj al apuda valo por spuri la murdintojn de du anoj de germana geologia ekspedicio».

La unua etapo de la vojaĝo estis sur serpentumanta nepavimita vojo, plena de erozi-ravinetoj. «Ĝi estas pli malbona dum la pluvsezono,» Robertson diris. «Nuntempe nur niaj polic-veturiloj trafikas sur ĝi. Bedaŭrinde, eĉ per ĵipo ne estas eble atingi la vilaĝojn sur la plej altaj montoj. Vi devos iri perpiede kaj suprengrimpi apikan krutaĵon kvincent futojn altan.»

«Jes, mi vidis la malebenan terenon alvenante tien ĉi per aviadilo.»

«La indiĝenoj havas la famon esti same sovaĝaj kiel la pejzaĝo. Iliaj vilaĝoj estas malgrandaj kaj ofte, kiam mi iris tien, ŝajnis, ke neniu troviĝas en ili. Sed tuj kiam okazas io grava, la tuta tribo subite aperas kaj en kazo de maltrankvilo, oni povas vidi homon malantaŭ ĉiu arbo.»

«Ĉu vi ne menciis hieraŭ vespere viron, kiu eble povos helpi min?»

«Jes, Ngguyop. Espereble li ankoraŭ loĝas en la vilaĝo, kie vi intencas resti. Li sufiĉe bone parolas piĝine, ĉar dum iom da tempo li laboris ĉe marborda kokusplantejo. Sed atentu! Li ne estas la plej honesta homo en la mondo, do ne fidu lin tro.»

Tagmeze la oficiro haltigis la veturilon antaŭ rivereto, anoncante, ke tie ĉi troviĝas la fino de la surveturebla vojo. Li enmanigis al mi detalan mapon de la tribaj teritorioj kaj fingromontris al malargaa, apenaŭ videbla vojo, kiu malaperis en la densa arbaro. «Tiu vojeto kondukas al la vilaĝo. De nun vi estos izolita de ni kaj vi devos agi memstare. Se ni ne ricevos novaĵojn pri vi pli frue, ni sendos la helikopteron post unu semajno por porti vin reen al nia bazo. Bonan sanĉon!» Ni reciproke manpremis kaj la leŭtenanto enĵipiĝis. La motoro ekzumis kaj la veturilo rapide malproksimiĝis.

Surŝultriginte mian pezan tornistron, mi ekpaŝis sur la vojeton. La supreniro estis peniga, kaj mi atingis la vilaĝon, ŝirmatan de fortika palisaro, tuj kiam la suno estis subironta. Robertson pravris. Mi ne vidis multajn homojn apud la dudeko da kabanoj. Kelkaj virinoj balais la grundon antaŭ la dometoj, kaj aro da infanoj scivole sekvis min. Finfine, unu el la pli aĝaj knaboj komprenis, kion mi volis, kaj kondukis min al la domo de la viroj. Tie mi trovis Ngguyop. Li estis tipa papuo kun karbonigra haŭto, laneca hararo, hok-nazo kaj barbo. Kiam li ekstaris por saluti min, li estis apenaŭ kvin futojn alta.

Ngguyop parolis piĝinon pli flue ol mi kaj insistis, ke mi klarigu, kial mi venis al la vilaĝo. Pro la skeptika mieno de la indiĝeno dum la tuta interparolado, mi sentis, ke li ne estis konvinkita, ke mi estas simpla naturessploristo, kiu volas studi kaj fotografi la montaran flaŭron kaj faŭnon. Mi timis informi lin pri la

vera celo de mia vizito. Post iom da marĉandado, ni akordiĝis pri la prezo por liaj servoj kiel interpretisto kaj gvidanto.

Ĉe la rando de la vilaĝo Ngguyop trovis por mi neokupitan, tre kadukan kabanon. Dum mi ĉirkaŭrigardis, li scivole demandis pri okazaĵoj en la distrikta vilaĝo. Kion faras lia bona amiko, la leŭtenanto? Kiom da policanoj estas en la ĉefstabejo nun? Ĉu estas paco en la ĉirkaŭaĵo? Mi rakontis pri la taĉmento sendita al la najbara valo, sed post momenta konsidero, mi ekkomprenis, ke mi estus devinta silenti pri tiu afero. La ruzulo eligis gravan informon, kaj tio poste havis malbonajn sekvojn.

Ngguyop lasis min en la kabano, por ke mi malpaku kaj ordigu miajn aĵojn, sed antaŭ ol mi povis senti min kiel hejme, li revenis por sciigi min, ke mi troviĝas en la vilaĝo je tre maloportuna tempo. Li klarigis, ke ĝuste nun la tribanoj preparas militiron kontraŭ la bestioj en la vilaĝo trans la rivero. Oni devas venĝi vilaĝanon, kiu antaŭ du semajnoj estis embuske mortigita de tiuj fiuloj. Ngguyop avertis min, ke mia vivo estas endanĝerigita, kaj estus pli bone tuj foriri. Mi protestis, ke tio ne estas ebla, ĉar la polic-helikoptero venos nur post semajno. Li murmuris por montri sian malplaĉon, sed li evidente ne vidis alian solvon.

Unu horon poste, promenante tra la vilaĝo, mi trovis ĝin senhoma, pliguste senvira. Ĉe la leviĝo de la luno, ĉiu viro kapabla porti lancon, iris razii la malamiĝan vilaĝon. Ĉe la tagiĝo la sangmakulitaj militirintoj revenis. Ne ĉiu, kiu iris, sukcesis forlasi la batalkampon viva. Ankaŭ la kontraŭuloj perdis homojn. Mi vidis kvar virojn portantaj sur longa, maldika arbotrunko la senvivan korpon de malfeliĉa viktimo de la ekinvado.

Posttagmeze Ngguyop venigis min al la ceremonia tereno, kie viroj fosis grandan kavaĵon en la grundo. Mi nombris almenaŭ ducent apudstarantojn.

«Kio okazos tie ĉi?» mi demandis mian gvidanton.

«Oni preparas festenon por celebri la venkon,» li diris kun rikana grimaco. «Tio estas ter-forno por kuiri la manĝaĵojn.»

«Ĉu mi povas foti dum la festo?» mi naive demandis.

Ngguyop vidis, ke mi ankoraŭ ne tute komprenis. «Jes, sed je via propra risko. Rigardu, oni nun preparas la viandon.»

Apud la foso mi vidis la kadavron de la mortigita viro sternita surtere. Li jam estis senkapigita, kaj kelkaj viroj komencis dispecigi la korpon per ŝtonaj adzoj kaj tranĉiloj el fendita bambuo.

«Tie sur la fajro oni rostas la plej delikatajn tranĉaĵojn. La resto de la korpo estos kuiriita kun foliaj legomoj en la terforno. Post unu horo ĝi estos preta.»

Mi ne povis forkuri nun, ĉar Ngguyop

restis konstante ĉe mia flanko. Post la kuirado, oni distribuis la viandaĵojn al parencoj de vilaĝanoj, kiuj mortis dum la intervenĝado. La patrino de unu el la batalintoj proponis al mi pecon da viando. Ngguyop ŝmacis per siaj lipoj por montri, ke ĝi estas vera frandaĵo. Mi estis en tre malfacila situacio. Kiel gasto mi ne rajtis rifuzi manĝi ĝin, kaj mi apenaŭ havis tempon pripensi la aferon. Mi disvolvis la foliojn ĉirkaŭ la bruniginta karnopeco. Bonsance, la korpoparto ne estis rekonebla. Fermante miajn okulojn, mi rapide englutis ĝin. La virino kontente ridklukis. Ŝia edzo komprenigis al mi, pere de la interpretado de Ngguyop, ke liaj kuntribanoj manĝas la malamikon, ne nur por ricevi la potencon akumulitan en ties korpo, sed ankaŭ ĉar la karno mem estas bongusta. «Kredu min,» aldona la olda sendentulo, brue suĉante rostitan ripon, «ĝi estas same bona kiel porkoviando — eble pli bona!».

Kiam alvenis la nokto, mi sukcesis forŝteliĝi. Svitante kaj ŝanceliĝante, mi eniris mian kabanon kaj provis firmigi miajn streĉitajn nervojn per kelkaj glutoj da viskio. Poste, per la lumo de poŝlampo, mi komencis skribi notojn pri la eventoplena tago, sed miaj ankoraŭ grasaj fingroj makulis la paĝojn de la libreto. Ankaŭ la fumo de la fajro naŭzis min.

Mi eliris por lavi miajn manojn en la rivero. Subite mi aŭdis de supre la sonon de motoro. Antaŭ la helaj nuboj prilumitaj de la plenluno, vidiĝis la silueto de helikoptero. Post kelkaj minutoj ĝi alteriĝis sur ebenaĵo apud la rivero, kaj Robertson descendis, sekvata de du policanoj kun papfretaj karabenoj.

«Kiel vi fartas?» la leŭtenanto vokis de malproksime. «Mi timis, ke vi fariĝis la ĉefplado de la ĉi-vespera bankedo.»

«Ne ŝercu,» mi diris serioze. «Vi malfruis. Jam okazis razio.»

«Jes, ni informiĝis pri la bataleto. La piloto, revenante de la proksima valo, ekvidis la brulantan vilaĝon. Fakte, ni ne estus povinta fari multon. La fulmorapida venĝoatenco sukcesis. Du aŭ tri viroj

de ambaŭ flankoj mortis. Tio signifas, ke la milito finiĝis. La loĝantoj de la detruita vilaĝo jam fuĝis aliloken en la montaro. Dum kelkaj monatoj estos paco sur tiu ĉi monto.»

«Kion vi planas fari nun, puni la homojn, kiuj komencis la batalon? Mi suspektas, ke tiu Ngguyop estis unu el la ĉefintrigintoj.»

«Ha!» la oficiro ridis. «Se vi nur povus trovi lin. Mi jam diris al vi, ke tiuj tribanoj aperas kaj malaperas kiel ombroj. Se vi reirus al la vilaĝo nun, mi estas certa, ke vi trovus nenium tie. Ne — ne valoras resti tie ĉi nun. Venu, estas ankoraŭ unu vaka sidloko en la helikoptero. Aŭ ĉu vi preferas reiri perpiede?»

Mi rapidis al la kabano. Ankoraŭ bruletis ŝtipetoj en la fajrejo, kaj en la duonlumo mi vidis, ke mi ne estas sola. Kaŭrante apud la muro estis Ngguyop. Antaŭ li troviĝis mia malfermita tornistro.

«Kion vi faras tie ĉi?» mi demandis, ekprenante mian pakaĵon.

«Mi venis por adiaŭi vin, mia amiko,» li diris, ekstarante kaj ridetante. «Ni estis kuntablanoj ĉe la bankedo, ĉu vi ne memoras? Kion vi opinias pri nia kuirarito? Ĉu oni bone manĝigis nian gaston?»

La papuo kaj mi staris vizaĝo kontraŭ vizaĝo. Sub liaj elstaraj brovarkoj la okuloj eligis fajrerojn. La blanka ostornamaĵo transverse fiksita en lia nazo donis al li la aspekton de enkarniĝinta diablo.

«Viaj kutimoj estas sovaĝaj, malnobligaj! Vi kanibaloj ne meritigas la nomon homoj!» mi kriis, vomante mian indignon kontraŭ li.

Metante unu el siaj fingroj sur mian bruston, li muĝis, «Kial vi nomas niajn kutimojn malnobligaj? Kion vi manĝas, blankulo? Bovinojn, ŝafojn, kortbirdojn, ĉiujn malsuperajn bestaĵojn,» li replikis, kraĉante surteren. «Male, ni manĝas la homon, kiu estas la plej granda kaj super ĉio!»

Mi ĵetis mian notlibron sur la ardantaj lignopecojn kaj kuris al la helikoptero.

18-a ALVOKO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

En oktobro, kaj en la kadro de la Kataluna Esperantista Renkontiĝo, reokazos, post 42-jara ĉeso, tiu tradicia Beletra Konkurso-Festo kiu iam tiel prestiĝe allogis poetojn kaj prozistojn esperantlingvajn. Limdato por sendi la konkursojn (laŭ poŝtstampilo) estos la 30 de junio. Do, kiel eble plej baldaŭ, bonvolu peti la koncernen Regularon (se eble kunsendante responkuponon) al unu el la du jenaj adresoj:

Salvador ARAGAY, str. Bassegoda, 40, 3-1, Barcelona-14, Hispanujo.

Gabriel MORA i ARANA, str. Carrió, 5, 4, Manresa (Barcelona), Hispanujo.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro Ivo Lapenna
N-ro 12

14. TRADUKOJ EL ESPERANTO

14.1 *Retoriko en la japana.* — La konata verko de Prof. D-ro Ivo Lapenna, kies unua eldono estis publikigita en 1950, la dua en 1958 kaj la tria en 1971 (entute 6.500 ekz.), ĵus aperis ankaŭ en la japana, tradukita de s-ro Teruhisa Kojima. La japana eldono konsistas el konciza biografio de la aŭtoro, antaŭparolo de Prof. G. Waringhien kaj du volumoj. Sub la titolo «Elokventeco de la Morgaŭo» la Unua Volumo enhavas ne nur la tradukon de la Unua Parto de *Retoriko* («Lingvo»), sed ankaŭ ekstraktojn el ĉ. 22.4 de *Esperanto en Perspektivo* («Propono al Unuiĝintaj Nacioj») kaj el aliaj ĉapitroj de tiu verko. La Dua Volumo — titolita «Retoriko» — konsistas komplete el la traduko de la Dua Parto de la originalo. La du volumoj estas bele presitaj kaj forte binditaj. Samtempe estas eldonita japanlingva reklamafiŝo sur glacea papero kun reprodukto de la foto pri la transdono de la Propono al Unuiĝintaj Nacioj la 6-an de oktobro 1966.

En la lastaj informoj, s-ro Teruhisa Kojima nun traktas kun la granda kompanio *Book Sale Co.* pri la distribuo de la verko. Se la traktado sukcesos, la japana eldono estos vendata en ĉiuj iom gravaj japanaj librovendejoj.

14.2 *Parto de EeP en la japana.* — S-ro Koiĉi Joŝimiĉi tradukis ĉap. 4.6.1 de *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 83-93) en la japanan kaj publikigis la tradukon en la marta numero (1977) de la *Buleno de Kanazava Nisui Altlernejo*. Pro la bedaŭrinda stato de ĉiaspecaj plagiatoj kaj intelektaj ŝteloj en la nuntempa Esperanto-Movado (v., ekzemple, en *Horizonto* 5/76 p-oj 113-115; en 11.1 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* 6/77, estas plezuro rimarkigi, ke s-ro Koiĉi Joŝimiĉi ne nur petis kaj ricevis permeson por la traduko, sed ankaŭ korekte menciis la originalan fonton.

D-ro T. Carlevaro povos taŭge kompletigi sian ĉap. 7.4.1 de *EeP* per tiu ĉi ero.

15. PERSEKUTOJ

15.1 *Jurij Belov.* — *Horizonto* informis en n-ro 5/77 (p-oj 100 kaj 102), ke la Tria Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado intervenis favore al liberigo de esperantisto Jurij Belov, unue kontraŭkonstitucie arestita kaj kondamnita kiel mense sana persono pro «kontraŭsoveta» kritiko, kaj poste kontraŭleĝe tenata en mensa hospitalo. La Konferenco sendis leteron al la Internacia Centro de Amnestio Internacia en Londono kun firma apogo al ĝia agado por la liberigo de Belov, kaj telegramon al la Prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, s-ro L. K. Breĵnev, informante lin pri la apogo de la Konferenco al Amnestio Internacia en tiu ĉi afero. La Konferenco sendis detalajn telegramojn ankaŭ al UEA kaj SAT proponante al ili entrepreni similajn paŝojn. Poste Prof. I. Lapenna, kiu ankaŭ ekster la kazo de J. Belov helpis kaj plu helpas al Amnestio Internacia per juraj konsiloj, intervenis ĉe ĝia Internacia Centro en Londono. Unuopaj partoprenintoj de la Konferenco kaj aliaj apogantoj de la humaneca esperantismo siavice intervenis en Vieno, Kopenhago, kaj en aliaj lokoj ĉe la regionaj oficejoj de Amnestio Internacia.

En la organo de UEA aperis nenio pri tiu tuta afero, nek estas konate ĉu tiu organizaĵo entreprenis kiu ajn paŝon. Male, laŭ *Sennaciulo* de novembro 1977 (frontpaĝo), SAT ekagis kaj, same tiel, pluraj ĝiaj membroj. En aŭtuno 1977 D-ro Tazio Carlevaro sendis cirkularan leteron al esperantistoj kaj Esperanto-amikoj en Svislando instigante ilin sendi leterojn al Ministro pri Sano de USSR favore al liberigo de Belov. Bazante sin sur informo de la pariza *Le Monde* de 22.12.77, *Sennaciulo* de februaro 1978 publikigis sufiĉe longan artikolon sub la titolo «Juri Belov liberigita» kaj trafan komenton sub la titolo «For la persekutojn!» en la rubriko *Ĉies opinioj*. Nek *Sennaciulo* en la du menciitaj numeroj, nek D-ro Carlevaro diris unusolan vorton, ke la tuta agado favore al liberigo de J. Belov estis iniciatita kaj forte apogita de la Tria Konferenco de NEM kaj de ĝiaj unuopaj partoprenintoj. Tia prisilento, precipe en tia humaneca afero, estas profunde bedaŭrinda.

La redaktoro de tiu ĉi rubriko posedas kompletan, ampleksan dosieron pri la kazo de J. Belov. En la sekvanta numero de *Internacia Jura Revuo* aperos jura analizo de tiu kazo, bazita sur sendube establita faktoj. El tiu dokumentaro sekvas, ke Belov certe estis esperantisto kaj estis en kontakto kun alilandaj esperantistoj. Tamen, ne estas tute certe, ĉu J. Belov fakte estas liberigita. Laŭ la ĵus ricevita sciigo de la Internacia Centro (fine de februaro), Amnestio Internacia ankoraŭ atendas firman konfirmon pri tiu novaĵo.

Sunerflue diri, ke la Manifesto 77 de la Esperanto-Movado — Por Paco en Libereco, Por Libereco en Paco — estas principa apogo al la humaneca laboro de Amnestio Internacia, inkluzive ĝiajn klopodojn liberigi J. Belov el mensa hospitalo.

15.2 *Kontfisko.* — *SAT-Amikaro* de oktobro 1977 informis, ke *Sennaciulo* «ne povas eniri en kelkajn 'socialistajn' landojn» kaj nomas tion «skandale hipokrita malpermeso». La nederlanda *Komuna Esperanto-Gazeto represis* tiun artikolon en la decembra numero kaj eble tial ankaŭ la koncerna numero, same kiel kelkaj aliaj Esperanto-perio-

dajoj, «ne povos eniri» en tiujn kelkajn landojn, alivorte ili estos konfiskitaj.
Tiu ĉi ero rilatas al ĉap. 21.4 de *EeP*.

16. KIEL KEJA NOMBRAS SIAJN MEMBROJN?

Tiu ĉi rubriko jam plurfoje atentigis pri la absurde fantaziaj ciferoj, per kiuj TEJO kaj ĝiaj sekcioj blufas rilate la nombron de siaj membroj. Iom pli detale tio estis farita en *Horizonto* n-ro 12/77, p. 136. El la TEJO-paĝo de la revuo *Esperanto* por januaro 1978 oni fine povas ekscii kiamaniere Kroatia Esperantista Junulara Asocio (KEJA), siavice «nur parto de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio», siavice nur parto de TEJO, siavice junulara sekcio de UEA, kalkulas siajn membrojn. Laŭ la Estrara Raporto de UEA por 1976-77, la jugoslavia sekcio de TEJO havis precize 3000 (1500) membrojn, do en bela ronda cifero ekster krampoj kaj en krampoj, kiuj lastaj devus «indiki la membrojn pli ol 25-jarajn». Ne estas klare el la Estrara Raporto ĉu la enkrampaj 1500 est as inkluzivitaj en la senkrampaj 3000, aŭ ilidevus esti aldonitaj al la senkrampaj 3000, tiel ke la tuta membraro de la jugoslavia sekcio de TEJO estus nek pli, nek malpli, sed precize 4500, dum en tuta Jugoslavio UEA en 1976 havis 590 AM kaj 160 IM, sume 750 membrojn! (*Esperanto*, marto 1977, p. 58). Do, oni nun ekscias, ke el tiuj 3000 aŭ 4500 «membroj» KEJA havis precize 2500 (denove bela ronda cifero). Mi citas laŭvorte: «51,2% de ili estas lernantoj en la elementaj lernejoj, 31,9% estas mezlernejanaj, 8,4% studentoj, 3,6% laboristoj, 0,31% kamparanoj, ktp.; 10,5% estas vilaĝanoj, dum 89,5% vivas en la urboj». La raportinto — sm (ĉu ankaŭ li «pli ol 25-jara» membro de KEJA?) — ĉerpis tiujn informojn el la Bulteno n-ro 7/77 de la Respublika Konferenco de Socialista Unuiĝo de la Junularo de Kroatio (SUJK). Li komentis: «*Se ni en la Movado ne sukcesas eĉ registri la nombron de niaj adeptoj, tio ja — feliĉe — ne signifas, ke ili ne ekzistas?*». Kaj ni komentas, ke, unue, en la pasinteco ni ja sukcesis, se ne registri (kio fakte estas malebla), do almenaŭ sufiĉe realece taksu la nombron de Esperanto-parolantoj (neĝelernantoj), kaj, due, ke en la ĝishamburga UEA oni neniam miksis «adeptojn» kun «membroj». Tiu raporto de SUJK, liverita al ĝi de KEJA, ne parolas pri «adeptoj», sed pri *membroj*, nome pri personoj organizitaj kaj pagantaj kotizojn. Estas pli ol ridinde kaj en ĉiu okazo misgvide paroli pri komencantoj-infanoj en elementaj lernejoj kiel pri «membroj» de KEJA, eĉ se la pocente donitaj «informoj» entute estas ĝustaj, kio siavice estas pli ol dubinda. Se tiamaniere oni nombrus la «membrojn», tiam la ĝenerala, neŭtrala Esperanto-Movado havus centmilojn da «membroj», eble eĉ milionojn kalkulante la forpasintajn ekinteresiĝintojn, kiuj neniam ellernis la lingvon.

El la artikolo en *Esperanto* vidiĝas, ke KEJA fakte estas parto de SUJK, de kiu ĝi ricevas kaj financajn rimedojn kaj, kompreneble, direktivojn konformajn al la politika linio de SUJK. La artikolverkinto rekonas, ke KEJA, do, «intime kunlaboras kun sociopolitika organizaĵo», kaj li asertas, ke «la orientiĝo de KEJA estas pli ol ĝusta». Alivorte. laŭ la organo de UEA, fakte ne «intima kunlaboro», sed submetiĝo al sociopolitika organizaĵo estas «pli ol ĝusta», kvankam ĝi estas nete kontraŭa al la Statuto de UEA. La artikolo finiĝas per jenaj vortoj:

«*Socia izoliteco neniam estis signo de memstareco, sed nur de falsaj imagoj pri propra ekzisto kaj graveco. KEJA fariĝas parto de la socio en kiu ĝi vivas. Tio estas premiso por agi favore al Esperanto en tiu socio.*»

La Esperanto-Movado neniam estis, nek estas socie izolita, sed agis kaj plu agas en la socio, sukcesis socie enradikigi la lingvon, disvastigi ĝin tra la mondo kaj firmigi ĝiajn poziciojn. Al tio kontribuis ankaŭ la ĝishamburga UEA. La Esperanto-Movado nek havis, nek, espereble, havas iajn «falsajn imagojn», sed almenaŭ la Esperanto-Movado ekster la redakcio de *Esperanto* kaj de tiuj, kiuj permesas tian rekte ofendan skribadon, havas tre realecan konscion pri la propra ekzisto kaj socia graveco. Fine, la skribinto de tiu artikolo devus kompreni, ke «socio» ne estas identa kun «sociopolitika organizaĵo», sed estas multege pli vasta. Socio inkluzivas ĉiujn homojn, kiuj vivas en iu komunumo, inkluzive eĉ la malliberulojn. La antaŭmilita Jugoslavia Esperanto-Movado nek ligiĝis, nek submetiĝis al kiu ajn partipolitika organizaĵo, sed ja agis en la socio kaj atingis enviindajn rezultojn spite la malfavorajn kondiĉojn de la tiama diktatoreca reĝimo.

Tiu ĉi ero rilatas al ĉap. 17.3 de *EeP*.

17. «INICIATO DE UEA FAVORE AL INTERLINGUA»?

La bulteno *Revista de Interlingua* de decembro 1977 publikigis artikolon, kiu, laŭ tiu bulteno, aperis en *Construire*. «unu el la plej grandaj ĵurnaloj de Svislando la 9-an de novembro 1977». La artikolo komenciĝas per jenaj vortoj: «Post la iniciato de UEA favore al Interlingua estas urĝe prezenti al ĉiuj interesitoj la rimedojn, la eblecojn akiri rapide la scion de la nova lingvo...» Sekvas tre vulgara propagando por tiu lingvoprojekto — unu el la centoj neniam transformiĝintaj en vivantan lingvon de vivanta lingvokomunaĵo — kun la jam konataj falsadoj de Esperanto. La enhavo de tiu artikolo ne meritis kian ajn atenton, se ĝi ne komenciĝus per la supre cititaj vortoj. *Horizonto* jam plurfoje atentigis pri la seriozaj danĝeroj, al kiuj kondukas la manio de «planlingvismo» kaj «interlingvistikismo», nun jubilitaj tra la Esperanto-Movado ligita al UEA kaj komforte sidantaj eĉ en ĝia CED, kiu havas nenion komunan kun la ĝishamburga

CED. Ne estas surprize, ke la bulteno *Revista* komprenis tion kiel «iniciaton de UEA favore al Interlingua». Aŭ, eble, ekzistis eĉ iu alia, pli eksplicita «iniciato», ankoraŭ nekonata? En la nunaj kondiĉoj ĉio estas ebla. Ankaŭ ne estas konate, ĉu UEA iel reagis, kvankam ĝi estis informita pri la afero per letero de s-ro Lic. K. G. Eliopulos de 19.01.1978.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20.2.2 de *EeP*.

GRAVA ATENTIGO: Represo aŭ alimaniere lojala utiligo de kiu ajn el la tekstoj publikigitaj kaj publikigitaj en tiu ĉi rubriko de *Horizonto* estas permesita kondiĉe ke la fonto estu indikita kaj informo pri la utiligo estu sendita al la redaktoro de la rubriko.

LA KONKLUDOJ DE NEM-KONFERENCO KAJ LETERO DE UEA-KOMITATANO TIMIGIS PREZIDANTON DE STOCKHOLMA ESPERANTO-KLUBO

Por la 21-a de septembro la Stockholma E-klubo anoncis kunvenon kun raportoj pri diversaj E-aranĝoj dum la somero. Mi partoprenis ĝin kun intenco raporti pri la 3-a NEM-Konferenco okazinta en Humlebaek, Danlando. La prezidanto de la klubo, s. Sven Aleksandersson, akceptis mian peton kaj ne rifuzis aŭdi ankaŭ mian raporton. Tamen li demandis min /antaŭ ol malfermi la kunvenon/ «Ĉu vi intencas paroli kontraŭ UEA». Mi respondis: «absolute ne!».

La unua raportanto estis li, la prezidanto, kiu parolis pri la kongreso en Rejkjavik. Li raportis sufiĉe detale.

Post la raporto pri la KELI-kongreso la prezidanto invitis min. Mi parolis inter 5-7 minutoj. Mi menciis, ke NEM ne estas asocio de registritaj membroj, kun membrokoto; NEM nur daŭrigas la tradicion de la politike neŭtrala Esperanto-Movado kaj esprimiĝas ĉefe per *Horizonto* kaj la jaraj konferencoj de NEM.

Mi akcentis, ke ĉiu esperantisto devas scii, kio okazis dum la kongreso en Hamburgo. La veraj okazintaĵoj estas priskribitaj en la libro «HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO» de Prof. Lapenna kaj mi rekomendis al ĉiuj tralegi ĝin. Poste mi volis laŭtlegi la Konkludojn de la Konferenco, sed la prezidanto Sven Aleksandersson malpermesis! Kvankam mi diris, ke la legado de unu paĝo kaj duono povas daŭri apenaŭ 2-3 minutojn, li tamen ne permesis. Mi deklaris, ke mi proponas nek diskuton, nek voĉdonadon pri la konkludoj, sed nuran legadon. Li ne permesis.

Aldone mi menciis ke la NEM-Konferencon ĉeestis komitatano de UEA, prof. Simonnet kiu fervore partoprenis en la diskutoj. Li foriris unu tagon pli frue al Rejkjavik kaj lasis al la NEM-Konferenco leteron, kiun mi volis laŭtlegi. Sinjoro Sven Aleksandersson ankaŭ tion ne permesis. La pravigon de sia «prezidanteco» konduko s. Aleksandersson klarigis per jenaj motivoj:

1. En la libro «Hamburgo en Retrospektivo» estas prezentita la afero nur unuflanke kaj ni devas koni la aferon de ambaŭ flankoj.

2. Pri la internaj problemoj ni esperantistoj ne devas diskuti publike.

3. En la dana ĉiutaga gazeto «Politiken» estis publikigitaj leteroj pri la okazintaĵoj en UEA kaj tio jam sufiĉas.

4. La problemoj kiuj estas priskribitaj de prof. Lapenna estas tiukarakteraj, ke nia Esperanto-Movado ne estas sufiĉe forta por ŝanĝi ion en la aferoj, kiujn ni eĉ ne akceptas, do, ni devas silenti kaj ne kritiki kion ajn.

Mi ree deklaris ke la okazintaĵoj devas esti konataj kaj diskutataj inter esperantistoj; kaj mi proponis diskutojn en la klubo, kie ni havos iom pli da tempo. Mi pretis prezenti la okazintaĵojn laŭ mia scio.

La prezidanto s-ro Aleksandersson diris: «Nenia diskuto pri tiu afero estas necesa!»

La kunvenon ĉeestis 23 personoj, inter ili ankaŭ estraranoj de la klubo.

Nun mi direktas kelkajn demandojn unue al la anaro de Stockholma Klubo: La rajto paroli publike kaj kritiki aferojn, kiujn oni opinias malĝustaj, estas akceptita kiel memklara en la mondparto, kie regas demokrataj principoj. Certe vi aŭdis ankaŭ multajn publikajn parolojn, kies ideojn vi ne akceptas, sed neniu el vi postulis, ke tiaj paroloj estu malpermesitaj. Ĉu la anaro de Stockholma E-Klubo kaj la prezidanto s-ro Aleksandersson estas homoj, kiuj la elementajn demokratajn rajtojn ne akceptas kaj kontraŭas? Ĉu laŭtlegi publikan leteron de UEA-komitato al 23 esperantistoj estas afero danĝera por la Esperanto-Movado? Ĉu aperigitajn leterojn en «Politiken», kiun legas dekmiloj da homoj neesperantistoj, vi opinias nedanĝeraj, ĉar en tiuj leteroj estis priskribitaj la deklaroj de la nuna UEA-estraro? Sed prezenti al 23 geesperantistoj nian aferon, vi opinias danĝera, ĉar ĝi esprimas la opinion de la «alia flanko»?

Fine mi turnas min al la nuna UEA-estraro. En la 3-a NEM-konferenco via komitatano, prof. Simonnet, parolis kiom ajn longe li deziris (kaj li parolis ne malmulte!). Neniu partopreninto de tiu konferenco akceptis la esprimatajn ideojn de via komitatano sed al NENIU konferencano venis eĉ la ideo limigi la parolrajton de prof. Simonnet! Sed laŭtlegi lian leteron, verŝajne esprimantan vian opinion, povas esti danĝera por UEA!

Mi direktis demandojn al la nuna UEA-prezidanto s-ro Tonkin, sed eble vi do volas scii, kiu estas la demandanto.

En UEA mi estis membroabonanto ekde la jaro 1950. Komence de la jaro 1977 mi informis nialandan peranton, ke por la koncerna jaro mi la jarkotizon ne pagos; tio ne devas signifi, ke mi definitive forlasis UEA. Mi aniĝis al UEA en la jaro 1950, ĉar ĝis tiu jaro mi vivis en landoj sub reĝimoj, kiujn servas la nunaj UEA-manipulantoj, t. e. dank' al ties favoro vi estis elektita. Dum tiuj jaroj, kiam mi vivis sub la supre menciitaj reĝimoj, Esperanto estis nomata kosmopolitismo, kaj kosmopolitismo estas burĝa ideologio. Burĝa ideologio ne povas esti tolerata en tiaj ŝtatoj. Mi estis en UEA simpla membro, nur paganta la kotizon kaj ĉeestanta kongresojn, sed la ideoj de UEA estis por mi unu el la ĉefaj elementoj en mia spirita vivo.

En unu el viaj paroloj dum la kongreso en Kopenhago vi interalie diris, ke «ankaŭ ni kapablos defendi la homajn rajtojn». Pertio vi verŝajne volis ankaŭ esprimi, ke por la esperantistoj en tiuj landoj estos eble aktive partopreni en la ĝenerala Esperanto-Movado. Nun mi demandas: Dum la NEM-konferenco estis preparolita informo el la gazeto «L' Aurore» devenanta de *Amnesty International*, ke en Sovetunio estas enkarcerigita en mensmalsanulejo esperantisto Juri Bjelov pro Esperanto-agado. La NEM-konferencanoj sendis al Sovetunia ŝtata kaj partiaĉefo telegramon, postulantan, ke la supre menciita esperantisto estu liberigita. La NEM-konferencanoj ankaŭ sendis rekomendtelegramojn al LKK en Reĵjavik kaj al OKK de SAT, ke ili sendu similajn telegramojn, por helpi al la esperantisto. Dum la supremenciita klubo-kunveno en Stockholmo s-ro Aleksandersson menciis preskaŭ ĉiujn erojn dum la okazinta kongreso, sed pri la sendita telegramo al la sovetunia ĉefo menciis nenion. Mi estas preskaŭ certa, ke helpi la esperantiston Juri Bjelov vi ne havis kuraĝon kaj prisilentis la tutan aferon. Ĉu tiamaniere vi defendas la homajn rajtojn de enkarcerigita esperantisto en Sovetunio; aŭ ĉu la UEA-prezidanto ne devas esti respondeca pri siaj deklaroj en kongresoj?

Nun mi anoncas: se iu esperantisto, leganta ĉi tiun mian skribaĵon deziras havi la kopiojn de NEM-Konkludoj kaj de la letero de UEA-komitatano, prof. Simonnet, dokumentojn «timigantajn» por la prezidanto s-ro Aleksandersson, mi volonte ilin sendos kontraŭ pago de la kopi- kaj sendkostoj.

Peter Diksztejn

NUNTEMPAJ ESPERANTO - KURIOZAĴOJ

LAŬDINDE, SED...

En la Komitato de UEA jam longe antaŭ Hamburgo troviĝis s-ro Jan Strönne, samtempe prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio. Antaŭ Hamburgo lia filino Ulla Luin estis nomita komitatano A de UEA, dum ŝia edzo Franko Luin, la bofilo de Jan Strönne, estis unu el la kandidatoj al komitataneco B, proponitaj antaŭ la elektoj en la jam misfamaj cirkuleroj de la tiama partie politikiginta TEJO, de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj de la Asocio de Esperantistoj en Slovaka SR (detaloj en 5.3 de Hamburgo en Retrospektivo). S-ro F. Luin ne estis elektita komitatano B, sed, rezulte de la kontraŭstature manipulitaj elektoj en Hamburgo, li fariĝis komitatano C de UEA. Tiamaniere tri membroj de la familio Strönne-Luin eniris la Komitaton de UEA kaj samtempe okupas gvidajn poziciojn en SEF.

Estas tre laŭdinde, ke tutaj familioj parolas Esperanton, sed oni povas demandi sin, ĉu fakte la iam forta Sveda Esperanto-Federacio jam fariĝis tiel malforta, ke tri familioj devas troviĝi en la Komitato de UEA.

PLIA «FAMILIA RONDO»

En Reykjavik D-ro W. Bormann, estinta prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio, fariĝis ĝenerala sekretario de UEA. Siavice, post la eksigo de D-ro W. Bormann el la prezidanteco de GEA, lia edzino s-ino E. Bormann transprenis lian prezidantan oficon. Lia filo, s-ro Thomas Bormann, samtempe fariĝis prezidanto de Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj dum la lasta kongreso de TEJO li estis elektita ankaŭ sekretario de la Komitato de TEJO, formale junulara sekcio de UEA. Fine, D-ro A. Bormann — la patro de D-ro W. Bormann, bopatro de s-ino E. Bormann kaj avo de s-ro T. Bormann — plu estas eldonanto kaj redaktoro de sia Interlingvistika Informa Servo, kiun li, tute nature, utiligas kiel laŭtparolilon de sia familio.

Do, plia «familia rondo», sed certe ne en la zamenhofa senco. Plian fojon oni povas demandi sin, ĉu en la tuta nuna GEA kaj ĝia GEJ ne troviĝas almenaŭ kelkaj personoj, kiuj povus transpreni 2-3 aŭ eĉ nur 1 el tiuj funkcioj, kiujn nun okupas la membroj de unusola familio.

NOVA PREZIDANTINO DE LEEN

Dum la lasta jarkunveno de la Nederlanda Esperanto-Asocio «LEEN» montriĝis, ke s-ro J. Calado, la multjara prezidanto de la asocio, ne plu estis elektebla. Ankaŭ fino

M. Vermaas deklaris, ke ŝi ne plu deziras esti reprezentantino de LEEN en la Federacio de Esperanto-Organizaĵoj en Nederlando. Ĉar neniu proponis kandidaton por la ofico de prezidanto, s-ino Woessink-Nagata, la edzino de la iama estrarano pri financoj de UEA, «konsentis ke la ĉefestraro kandidatigu ŝin», kiel informas *Komuna Esperanto-Gazeto*. En la diskuto (sen la ĉesto de gesinjoroj Woessink-Nagata) «s-ino Van der Kooij opinias hontinda, ke neniu nederlandano estas preta» akcepti kandidatigon. El la protokolo sekvas, ke s-ino Woessink-Nagata «ne bone regas la nederlandan lingvon», sed ke «tio ne gravas». Tiamaniere japanino fariĝis prezidantino de la Nederlanda Esperanto-Asocio.

Por la konantoj de la nuna situacio en LEEN ne estas tre surprize, ke ne troviĝis nederlandano preta fariĝi prezidanto kaj ke tial la ĉefkunveno devis elekti personon, kiu eĉ ne scias kontentige la lingvon de la lando. Restas nekonate kial, ekzemple, s-roj Wensing, Woessink, Boersma kaj kelkaj aliaj nederlandanoj, kiuj tiel «aktivis» en la antaŭhamburga konspirado kaj en la hamburgaj eventoj, kaj kiuj tiel ambicie alkroĉiĝis al la tiam prestiĝa UEA, ne oferas iom da siaj pretendataj kompetentecoj al sia propra landa asocio, iam unu el la fortikaĵoj de la zamenhofa esperantismo en la mondo, por savi ĝin el la nuna pli ol embarasa situacio. Ili ja havas almenaŭ unu bonan kvaliton por prezidanteco de LEEN: ili bone regas la nederlandan lingvon.

«SKANDALE HIPOKRITA MALPERMESO»

La nederlanda *Komuna Esperanto-Gazeto* (KEG) reprenis en numero de decembro 1977 la artikolon de R. Grandière «Antaŭ 90 Jaroj», publikigitan unue en *SAT-Amikaro*. La artikolo enhavas ankaŭ jenan parton:

«Estas dezirinde, ke la «akto de Helsinki» estu honeste aplikata de la subskribintoj, tiel ke ĉiuj esperantaĵoj povu libere atingi ĉiujn esperantistojn en la mondo. Tio estus simple konkreta aplikado de la «rajto pri komunikado». Ĉu ne estas skandale hipokrita la malpermeso, ke «Sennaciulo» ne povu eniri en kelkajn «socialistajn landojn»? Ĉu ne estas kondamninde, en la nomo de la libereco kaj de la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, malhelpi al unuopuloj, esperantistoj aŭ ne, laŭplezure kaj senkondiĉe vojaĝi eksterlanden? Ni, esperantistoj, vojaĝemuloj kaj scivolemuloj, povus multon rakonti pri tiuj atencoj kontraŭ la individua libereco.»

Bonege kaj tre aprobinde, ke kaj *SAT-Amikaro* kaj, multe pli kuraĝe, KEG fine aŭdacis aperte kondamni la konatajn «skandale hipokritajn» malpermesojn kaj la «atencojn kontraŭ la individua libereco», pri kiuj «ni esperantistoj» ne nur «povus multon rakonti», sed efektive pruvis per amaso da faktoj kaj dokumentoj, interalie en ĉap. 21 de *Esperanto en Perspektivo* kaj, plej laste, en la dua eldono (1977) de *Hamburgo en Retrospektivo*.

Tamen, iom naivaj personoj povus eble demandi sin kial la Universala Kongreso en Reykjavik, kies ĉeftemo estis la «Rajto je Komunikado», diris eĉ ne unu vorton pri tiuj kaj aliaj skandalaj malpermesoj, sed fuĝis de la realaĵo en abstraktajn sensignifaĵojn, kaj kial almenaŭ la nederlandaj membroj de la Komitato de UEA ne postulis konkretan kondamnon de la konkretaj «skandalaj malpermesoj» kaj de aliaj «atencoj kontraŭ la individua libereco». Krome, kial nek UEA, nek SAT subskribis la tekston de *Manifesto 77: Por Paco en Libereco — Por Libereco en Paco*, tute konforman al la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj eĉ al la Statuto mem de UEA?

TRA LA ESPERANTO GAZETARO

El AUSTRIA ESPERANTO-REVUO, 1977/10-12: «Kiel proponon al la Jarkunveno d-ro Klaus Perko estis sendinta por subskribo 'Manifesto-n 77'... Oni decidis transdoni la leteron al la Estraro por pritrakto». Estas redirinde, ke «MANIFESTO 77» plene kongruas kun la statuto de UEA (artikolo 4).

En STARTO, n.º 6/1977 enestas slipa enketa demandaro direktita al «*Estimataj eksterlandaj legantoj*». Nu sur la 16 bultenaj paĝoj 13 de tiu numero estas redaktitaj en ĉeĝa lingvo: konkludu mem.

En DER ESPERANTIST, 1977/5 Georgi Korotkeviĉ de Moskvo sur pli ol tri paĝoj himnas al la paco «*naskita sub la signo de la Dekreto de Lenin, 1917*». Krome «*elektiĝis kiel membroj de la Monda Packonsilantaro la prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev el Sofio/Bulgario kaj la ĝenerala sekretario de MEM el Tours/Francio William Gilbert*». Gratulon pro la senmaskigo de la realaĵoj, per kiuj ĉiam pli konfirmiĝas la politikeco de la «socialismaj» asocioj!

BULGARA ESPERANTISTO, 1977/9 publikigas brile argumentitan artikolon de prof. d-ro Stojan Guĝev titolitan «*Pri la 90-jara aĝo de Esperanto*». Jen kio estas pozitiva kontribuo al la disvastiĝo de Esperanto. Sed la 10-a, oktobra numero de 1977 estas plena je jubila patoso pri «*La Granda Oktobro 1917*» kaj republikigas la artikolon de Semjon Podkaminer jam aperintan kaj en DER ESPERANTIST kaj en STARTO pri «*Socialismo kaj internacia lingvo*... (Vid. en HORIZONTO, 1978/1.)

Nu, ĝuste al la argumentaro de Podkaminer respondas d-ro Artur Bormann en sia

INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO n.º 4/1977 (p. 43): «Ni trovas, ke tiu argumentado estas iom kontraŭdira kaj unuflanka. Se la kondiĉoj por la internacia lingvo estas tiel favoraj en la socialismaj landoj, kial la movado tie ankoraŭ ne pli progresis? La aŭtoro esprimas mem la rezervon, ke oni troviĝas ankoraŭ en prepara periodo. Tia aserto ne konvinkas. La lingvaj kondiĉoj estas en la oriento kiel en la okcidento same kaosaj. La registaroj faras nenion por ŝanĝi tion. La usona kaj brita registaroj ne havas intereson rezigni la akiritan hegemonion de la angla en interrilatoj kaj same la soveta registaro volos ne rezigni la privilegiitan internacian pozicion de la rusa. La amaso de la homoj en oriento kaj okcidento estas same pacemaj, neniu volas ankoraŭfoje sperti militon. Do tio ne estas argumento por aŭ kontraŭ la unu aŭ la alia flanko. Krome oni devas konscii, ke pacemo ne estas kondiĉo por la enkonduko de internacia lingvo, sed ĝi estas nur ĝia sekvo. Ankaŭ Zamenhof konstruis sian lingvon por krei per ĝi kondiĉon por la paca kunvivado de la homoj. Do unue la lingvo devas esti lernata kaj aplikata, kaj tiam la morala kaj spirita sinteno de la homoj ŝanĝiĝos kaj pli bona popola interkompreniĝo estos atendebla. Ne inverse, kiel la aŭtoro rezonas. Ke la Universalaj Kongresoj en la oriento estas pli multe frekventataj de homoj en la tieaj landoj, pravas nenion. Ĉar nur malmultaj esperantistoj ricevas la permeson kaj la devizaĵojn por veturi al kongreso en la okcidento. Tial esperantistoj el la oriento, kompreneble, pli vizitas tieajn kongresojn. Ni ne kredas, ke ideologiaj interpretadoj utilos al la solvo de la internacia lingvoproblemo. Oni devas realisme pripensi...¹ Tiel nekutima estas tia respondo sub la plumo de d-ro Artur Bormann, ke ŝajnas plej interesa citi ĝin, ĉar fare de li jen nova sonoril-tinto: ĉu temas pri vojiro al Damasko? Bedaŭrinde lia espera konkludo, ke «rezultiĝos laborbazo principe unueca por oriento kaj okcidento» forgesas la nepran kondiĉon tiucelan: diri, ke «la komuna membreco en UEA igas atendi tion», restas nesufiĉa, se samtempe oni ne revokas al respekto de la statuto kaj de la neŭtraleco laŭ ties artikolo 4.

Ankaŭ interesa estas la artikolo de d-ro István Nagy pri «La tria problemoj»: kiel venki la indiferentecon de la mondo; artikolo aperinta en BUDAPEŬTA INFORMILO, dec. 1977, p. 1/2. La aŭtoro, memorigante la ĉi-supre menciitan «problemon» de d-ro L. L. Zamenhof, prezentas nun la kvaran: «kiel venki la indiferentecon de la esperantistoj, kiuj tute ne partoprenas en la poresperanta laboro». Kiel ĝeneralan kaŭzon li diagnozas: «Indiferenteco estas antaŭ ĉio neinformiteco aŭ misinformiteco». Li kompreneble prisilentas la politikan kompromitiĝon de UEA, kiu forpelis kaj ankoraŭ fortenas multajn homojn, kaj li alvenas al tio, ke «ni bezonas ege multan monon aŭ ŝtatan/registarajn/ helpon». Kaj kiel atendite, li fine konkludas, ke pretaj helpi «tiaj registaroj troviĝas nur en la socialismaj landoj kaj la plej fortaj landaj asocioj estas en Pollando, Hungario kaj Bulgario». Ni notu la aserton, sed sur tia vojo ni ne iluziu nin «per tro granda espero» laŭ la konsilo mem de d-ro L. L. Zamenhof.

J. T.

¹ Verdire nek A. Bormann nek S. Podkaminer plene pravas: temas pri interrilato. Se «la paca kunvivado» kiel rezulto de interdependeco de la mondo estas ja kondiĉo por la ekzistado de la Lingvo Internacia, tamen tiu ekzistado mem de la lingvo kaj precipe la vastiĝo de ĝia uzo siavice kontribuas al «pli bona popola interkompreniĝo».



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon apud la literaturo kaj ne anstataŭ la literaturo.”

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

UEA KAJ LA NEŬTRALECO. D-ro Georges SALAN. Nimes 1977. eld. la aŭtoro. 15,8 × 21,9 cm. 12 p.

«Car ekzistas libera tribuno nek en ESPERANTO nek en HEROLDO de ESPERANTO, ĉar la abonantoj tute ne rajtas esprimi sian starpunkton en la ĉi-supre cititaj organoj, ili do devas mem ĝin publikigi kie kaj kiel ili povas.» Tia estas — laŭ la vortoj mem de l' aŭtoro — la ekzistopravo de la broŝuro, kiu klare elmontras per si mem, kion HORIZONTO ne ĉesis demonstri, nome la mankon de libera

opinieprimado en la nuntempa movado, kiel karakterizan kaj evidentan faktan de totalisma malneŭtraleco.

En 1-a punkto d-ro G. Salan plene rekonas, ke «Ivo Lapenna tute pravas dirante, ke la naciaj Esperanto-Asocioj de l'tiel nomataj socialismaj landoj ne estas neŭtralaj» (p. 5); sed, konsiderinte, ke tiuj asocioj ne povas esti neŭtralaj, li «opinionas, ke kvankam la statutoj de UEA, kiuj bezonus ĝisdatigon, ne permesas aliĝon de neneŭtralaj asocioj, ni devas (dum la jaro 1977 kaj tiom pli dum la venontaj

jaroj) esti pragmataj» (p. 9), alivorte: fermi la okulojn! La celo pravigas la rimedojn! Ja kion alian povas signifi pragmatismo, kiu instigas kaj membrojn kaj gvidantojn ne observi la fundamentan statuton?

Nu, koncerne la neŭtralecon ni simple memorigu, ke ĝis la jaro 1970 la malmultaj landaj asocioj de Orienta Eŭropo pli malpli respektis la statuton de UEA, almenaŭ formale, kvankam necesis ofte revoki ĝin al ili. Sed, tuj kiam komenciĝis la t. n. «*Konsultiĝoj de la Esperantistaj asocioj de la socialismaj landoj*», ili nenion plu observis. Sekve, nur pro sia propra agmaniero, kiu cetero estigis per si mem disduigon de la movado, ili ne plu rajtas resti aliĝintaj al statuto, kiun propracele ili malatentas; kaj ili devas laŭstatute fariĝi nur «*kunlaborantaj ne-neŭtralaj asocioj*»: tute ne temas la demando pri tio, «*ĉu ili povus esti neŭtralaj*», sed pri ilia statuta rajto aliĝi al UEA.

En 2-a punkto d-ro G. Salan prave distingas la komunistan individuon disde la komunistia asocio. Fakte estas, ke multaj «*kompartianoj*» de la «*socialismaj landoj*» nek partoprenis, nek aprobis la puĉon, kvankam ili ne rajtas deklari tion publike, ili eĉ riproĉas al la okcidentaj geesperantistoj, kiuj estas ja liberaj esprimi opinion almenaŭ buŝe, komplici per silento en la neniiga entrepreno de la «*socialismaj*» asocioj — neniiga, ĉar lingvo, kiu pretendas fariĝi komuna, ne devas transformiĝi en lingvon de nur unupartipolitika movado: igi la lingvon kultura portilo de nur unu ekskluziva politika partio, tio estas neniigi la kernan kvaliton de komuna lingvo, nome ties universalecon!

Sed, se laŭ la tradicio de 1905 en la Universalaĵ Kongresoj multaj homoj eĉ komunistaj kaj asocioj de diversaj ideologioj «*lasas*, kiel skribas la aŭtoro, *sian politikon en la vestejo*», nur la komunistaj asocioj per siaj gvidantoj tion jam de 1970 ne faras, kaj eĉ laŭ *interkonsentita plano*. Sufiĉas legi pri tio la instrukciojn de iliaj bultenoj aŭ revuoj. Plej ofte la malneŭtraleco montriĝas per cenzuro, kiu senbrue enkondukas totalisman reĝimon. Tiel nur por ne «*malplaĉi al D-ro Blanke kaj al s-ro Aleksiev*», al la reprezentantoj de la komunistaj asocioj, H. Tonkin laŭ la aŭtoro «*eĉ ne unu solan vorton diris pri*» la MANIFESTO 77, kiun do li ne prezentis al la Komitato de UEA nek al la Universala Kongreso, kaj tiu tamen koncerne al UEA estas nenio alia ol simpla konsekvenco de la statuta artikolo 4., artikolo akceptita de la Komitato *kaj de la Membraro en ĝenerala voĉdono jam de 1947*.

Certe d-ro G. Salan pravas, deklarante, ke «*malgraŭ kaj kontraŭ ĉiuj kritikantoj la interna ideo restas la kerno de Esperanto kaj ĝi alkroĉas al si ĉiujn tutmondajn esperantistojn, inkluzive la kompartianojn spite al iliaj laŭitaj mallaudoj*». Sed ĝuste tial nepre endas antaŭgardi la identecon, tiun humanecan internaciis-

mon, kontraŭ iun ajn ideologion fremdan al la esperantismo. En UEA estas antaŭviditaj laŭstatute diversaj lokoj por diversaj asocioj: neneŭtralaj asocioj havas kunlaborajn statusojn; kial fari escepton nur favore al komunistaj asocioj?

«*Anekse*» la aŭtoro ekzamenas la demandon, kial la komunistaj asocioj «*ne petas aliĝon al SAT*». Sed en liaj respondoj mankas unu argumento: la SAT-anoj estas politike pli spertaj ol la UEA-anoj. En la jaroj 1930/31, ĝuste kiam la kompartianoj provis nukleumadi ilian asocion, la membroj de SAT ne lasis sin invadi kaj simple forpelis la komunistan grupon.

J. T.

HONORE AL ILI, Memorlibro pri Falintaj Esperantistoj 1941-1945. Eldonis Kroatia Esperanto-Ligo laŭ komisio de Jugoslavia Esperanto-Ligo. 112 + xvi p., 14 × 20 cm, broŝurita, Zagreb, 1976. Prezo neindikita.

Kiel indikas la titolo, temas pri libro dediĉita al la memoro de jugoslaviaj esperantistoj, partoprenintaj en la rezistomovado de Jugoslavio kaj pereintaj aŭ en la naziaj-faŝistaj-ustasaĵoj¹ koncentrejoj kaj karceroj, aŭ kondamnitaj je mortpuno de «*eksterordinaraj tribunaloj*» kaj tuj ekzekutitaj, aŭ falintaj sur la batalkampoj.

La verko, redaktita de okmembra komitato kun Franjo Vokoun kiel respondeca redaktoro, bazigaĉe ŝefe sur la esplorlaboroj de M. Gjivoje, kiu kolektis kaj ordigis abundajn materialojn ricevitajn de sepdeko da informintoj kaj nombro da instancoj. Ĝi konsistas el Enkonduko de la eldonisto, longa artikolo de D-ro P. Zlatnar «*Ideoj kaj Agoj de Esperantistoj en Jugoslavio*», listo de la kontribuintoj, trarigardo de la viktimoj laŭ la ses respublikoj, pli aŭ malpli longaj biografietoj de 340 falintoj en aboca ordo, rememoroj de postvivintoj pri unuopaj viktimoj, koncizaj eltraĵoj el la verkoj de kelkaj el la falintoj kaj, fine, fotoreproduktaĵoj de 37 falintoj-esperantistoj, deklaritaj postmorte popolaj herooj.

Estis bonega ideo — kaj imitinda ekzemplo — publikigi tiun verkon. Ĝi estas ne nur omaĝo al tiuj noblaj kaj karaj homoj, kiuj, ofte post kruelaj torturoj, oferis sian vivon por la libereco, sed ankaŭ grava dokumento pri la progresema, humaneca kaj demokrata karaktero de la antaŭmilita jugoslavia Esperanto-Movado. En ĉiu biografieto troviĝas ankaŭ informo pri la eventuala membreco de la viktimo en iu el la lokaj Esperanto-societoj. Montriĝas, ke ne ekzistis unusola el la 38 Esperanto-societoj funkciaj antaŭ la invado de 1941, el kiu almenaŭ unu el la membroj ne estus pereinta en la koncentrejoj aŭ sur la batalkampoj. Se iu el la viktimoj estis membro de la Komunista Partio de Jugoslavio (KPJ), tio estas indikita, sed ne estas indikita la partia aparteno aŭ senpartieco de la tre multnombraj aliaj pereintoj. Ne enirante, almenaŭ ne por la momento, en kiun ajn

plian detalon de tiu aspekto, ĉi tie mi nur memorigu, ke en la periodo 1929-1941 la KPJ estis malpermesita, do agis konspire kaj «subtere». Sekve, oni ne sciis, nek povis scii, ĉu iu persono estis en tiu tempo membro de la KPJ aŭ ne, kvankam pri kelkaj oni povis supozoj tion. Plue, la KPJ de tiu epoko estis parto de la t. n. monolita soveta bloko sub la absoluta regado de Stalin, kies diktatoreca reĝimo malpermesis la lingvon kaj persekutis la esperantistojn (v. pri tio ĉap. 21.4 de *Esperanto en Perspektivo* kaj ĉap. 1.3 de *Hamburgo en Retrospektivo*, kiel ankaŭ la artikolon pri «proleta internaciismo» kaj humaneca internaciismo en *Horizonto* n-ro 4/77, p. 73). Efektive, troviĝis almenaŭ kelkaj el la esperantistoj membroj de la KPJ, kiuj rigore sekvis la linion de Moskvo kaj eĉ atakis Esperanton kiel esprimon de «burga kosmopolitismo», dum aliaj restis senkompromise fidelaj al Esperanto kaj al la humanecaj ideoj de la zamenhofa esperantismo, kaj sindone laboris por la disvastigo de la lingvo. Al tiu lasta kategorio certe apartenis ĉiuj falintoj (kaj nefalintoj), kun kiuj la recenzianto plej amike kaj intime kunlaboris dum multaj jaroj ĉu en Akademia Esperanto-Klubo, ĉu ekster ĝi. Tial, multe pli grava ol la aparteno de la viktimoj al tiu aŭ alia politika partio, estas la fakto, ke ili ĉiuj estis esperantistoj kaj kiel tiaj apartenis al la kontraŭdiktatura, kontraŭnazia, vaste demokrata fronto.

La eldonisto instigas al pluaj esploroj kaj kompletigoj por postaj eldonoj. Fakte, en la biografioj enŝoviĝis almenaŭ kelkaj eraretoj. Ekzemple estas korekte menciite, ke la falintoj Z. Bahorić, Ing. B. Borjan, J. Granĝa, V. Habijanec, A. Jelčić, A. Kraus, A. Mussi, V. Pajalić, D-ro A. Skatarić, P. Sparger-Sekelj kaj A. Turko-vić estis membroj de Akademia Esperanto-Klubo (AEK) en Zagreb, sed ne estas menciite, ke ankaŭ N. Hajligštajn, R. Papo kaj H. Pick estis membroj kaj tre aktivis en tiu Klubo. La nombro de falintoj, estintaj membroj de AEK, estas tre granda. Verŝajne ĝi estus eĉ pli granda, se la subskribinto, mem sur la nazia-ustaŝa listo de arestotoj, ne estus detruinta la ĉefan parton de la arkivo de AEK².

La enkonduka artikolo de D-ro P. Zlatnar bedaŭrinde estas plena de malĝustaĵoj pri la antaŭmilita Esperanto-Movado en Jugoslavio kaj rilate faktojn kaj rilate la interpretadon de la ĝuste menciitaj faktoj. Tio, kune kun la konsciaj prisilentoj, atingas la karakteron de kruda falsado de la historio de la jugoslavia Espe-

ranto-Movado. Necesos reveni al tiu demando en unu el la sekvantaj numeroj de *Horizonto*. Ĉi tie estu nur dirite, ke la rolo de Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb estas gravege subtaksita. Ĝia fondiĝo en 1929, kiu koincidas kun la reĝa diktaturo en januaro 1929, kaj ĝia efika laboro en intelektulaj, precipe studentaj medioj de Jugoslavio ĝis la tago mem de la invado de la naziaj trupoj, estas apenaŭ menciita. La aŭtoro mencias la landan kongreson en Zagreb en 1937, sed ne diras unusolan vorton pri la impona grandeco de tiu kongreso (ĉ. 500 partoprenantoj) kaj pri la fakto, ke dum tiu kongreso estis elektita la nova estraro de JEL, konsistanta el membroj de AEK kun la subskribinto kiel prezidanto. Li mencias sur p. 17 la Esperanto-konferencon dum la milito en la liberigita urbeto Livno (1943), sed prisilentas la fakton, ke la subskribinto invitis, organizis kaj prezidis tiun konferencon. Sur p. 19 estas menciitaj «jugoslaviaj delegitoj... aktive laborantaj por ordigo de organiza problemo en internacia movado (UEA, IEL)», sed denove estas prisilentita la nomo ne de «delegito» aŭ «delegitoj», sed de la koncerna komitatano kaj estrarano de IEL, poste UEA ekde 1938. Same pri la reprezentigo de UEA en la konferenco de Unesko en Montevideo kaj pri la Rezolucio de 1954. Ktp. Entute, la nomo de la subskribinto ne aperas en tiu longa artikolo, kio estas klara kaj konscia falsado de la vero. Mi tion sincere bedaŭras ne tiom pro la konscia prisilento de mia kontribuo al la jugoslavia Esperanto-Movado, kiom pro D-ro P. Zlatnar, kun kiu mi dum multaj jaroj amike kunlaboris por progresigo de nia komuna afero kaj en Jugoslavio kaj, poste, en UEA, kaj pri kies esperantista integreco mi ĝis nun ne havis kaŭzon dubi. Eble iam, en iu nova eldono, oni korektos tiujn malĝustaĵojn, kaj maljustaĵojn se ne pro aliaj motivoj, do por ne ĵeti ombbron sur la memoron de la falintoj.

Estus tre utile, se en aliaj landoj aperus similaj libroj memore al viktimoj de naziismo, stalinismo kaj aliaj diktatorecaj reĝimoj.

Ivo Lapenna

¹ Kroate *ustaŝa*, t. e. kroata nazio.

² La naziaj trupoj okupis Zagreb la 10-an de aprilo 1941. Kun ili venis la kroataj ustaŝoj. Jam la sekvintan tagon la ejoj de diversaj demokratiaj organizaĵoj, inter ili la sekretarioj de AEK en Primorska 2, estis sigelitaj. Per brulvarmigita razileto la subskribinto forigis la vakosigelon, eniris en la ejon, rapide kolektis la membrolistojn, protokolojn kaj aliajn identigajn materialojn, resigelis la ejon kaj poste detruis la tutan materialon.

LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA

Tiu ĉi grava verko aperis en eldono «Fundación Esperanto» de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fakto) Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5 × 25 cm, ilustrita, bindita. Prezo: 2.000 pesetoj plus 10% por sendokostoj.

Havebla ĉe F. E. Sekr. Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe via libroservo.

IV.a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Okazonta en Jaca, Hispanujo, de la 22^a ĝis la 29^a de Julio 1978
Sub la aŭspicioj de la Universitato de Zaragoza

Korespondadreso:
I. Gastón, P.º Marina Moreno ,35, 4.º
Zaragoza-1. Hispanujo

Konferenĉejo:
Palaco de Kongresoj kaj Ekspozicioj


PLEJ FRESAJ INFORMOJ

SOLENA MALFERMO. — La Solena Malfermo de la Konferenco okazos en la ĉefa salono de la Urbodomo. Prof. Dr. Ivo Lapenna faros la inaŭguran paroladon sub la titolo «Neŭtraleco kaj Humaneco».

PRELEGOJ. — Kiel informite en la Provizora Programo, en la labora parto de la Konferenco estos pritraktitaj du ĉeftemoj en formo de prelegoj kun postaj diskutoj. (1) *Eŭropo Hodiaŭ — Kulturaj kaj Politikaj Aspektoj.* (2) *Neŭtraleco kaj Neŭtralismo.* Jam promesis prelegi Prof. Dr. Ivo Lapenna, Dr. Paul Neergaard, Dr. Juan Régulo, Dr. Miguel Sancho Izquierdo, Sro. Jean Thierry...

INTERNACIA KURSO DE ESPERANTO. — En la kadro de la Konferenco, kaj organizita de la OKK, en kunlaboro kun la Hispana Sekcio de ILEI, okazos internacia, elementa kurso de Esperanto por neesperantistaj instruistoj. — Gvidos la kurson, la prestiĝa licea profesoro de lingvoj (germana kaj hispana), S-ro Daniel Luez, de Laon, Francujo. — Pliaj informojn ĉe la korespondadreso de la Konferenco.

EKSKURSOJ. — Unu el la plej belaj lokoj de la aragona Pirenea montaro estas la valo de Hecho kun ĝia impona montara arbaro Oza, kie la gigantaj abioj kaj korpu-lentaj fagoj grimpas dense sur la deklivoj de la montoj. Tri km. de Hecho survoje al Oza, situas vilaĝeto Siresa, kie meritas specialan atenton la Monaĥejo de «San Pedro de Siresa», de visigota tradicio, laŭ mencioj, jam ekzistanta en la IX^a jarcento, ĝi ludis gravan rolon en la Mezepoko. La preĝejo, nuntempe ankoraŭ staranta, apartenas al la XI^a jarcento, ĝi konsistas el ununura navo kaj absido, kaj konservas gravajn retablojn de la XIII^a kaj XV^a jarcentoj. Hecho — ĉefa loĝloko — de la valo estis lulilo de Alfonso I la Batalanto, reĝo de la pirenea dinastio aragona, kiu ekkreskis kaj edukiĝis en Siresa.



Preĝejo de Sankta Petro.

Foto Sicilia

ATENTU! Frua aliĝo al la Konferenco estas grava helpo por la Organiza Komitato. Ne forgesu ke en julio-aŭgusto ne mankas turistoj en Jaca.